

John Francis

# Kronprincdzino

John Francis



Kronprincdzino



FEL



Kronprincdzino

# **Kronprincedzino**

**John Francis**

# **Kronprincedzino**

## **Eldono de Flandra Esperanto-Ligo**

Tiu ĉi e-libro estas provlibro kaj rajtas esti libere kopiata.

# La Perloj de Lunlumo

*(En kiu la neŝanceblan lojalon de lakeo superas sole la princina rezonkapablo kiu povas percepti pruvojn pri ĝia neŝanceblo, kvankam li ne)*

**J**akto Filde Korsan Trevo destiniĝis al la imperia servo ekde la tago kiam lia familio certis ke la infano estos mense kaj fizike adekvata al la kariero de lia patro, Korsan, kaj ties patro, Jakto, kaj ĉiuj praavoj registritaj en la palacaj arĥivoj.

Kiam li ankoraŭ havis malpli ol dek du jarojn li komencis iniciiĝi en la devojn kaj taskojn kaj respondecon de palaca funkciulo, instruite de la plej aĝaj kaj spertaj membroj de la palaca oficistaro, ĝis li estis kompetenta pri ĉiu aspekto de ceremonia kaj ĉiutaga etiketo palaca.

Dum dek jaroj li okupiĝis pri ĝeneralaj taskoj tiaj, kiajn la organizo de la Palaco postulis, antaŭ ol la Ĉambelano informis lin ke li provizore transiĝos en la sekvantaron de Princo Zefreno, pli aĝa filo de la Heredonto.

“Tio ĉi malfermas perspektivojn, `de Korsan”, li komentis, anoncinte la decidon, “ – nu, kompreneble – sed ankaŭ enfalejojn. Kovadu do prudenton. Lia princa moŝto estas juna, sed ne supozu ke vi povos elprofiti tion. Alie, vi trovos kiel provizora estas `provizora`”.

Lia patro donis pli-malpli saman konsilon. Li jam estis en la persona servo de la Imperiestro, kaj li ĝojis ke lia filo trafiĝis en posteno kiu iam povos esti egale eminenta. “Ĉiam memoru kiu vi estas, Jaĉjo mia”, li urĝis. “Estadu servopreta, kaj portadu vian servopretemon kiel ŝildon. Kapricojn rajtas princoj, sed ni ne; male, ni adaptu nin al ĉiu renverso de ilia humoro. Ekzemple via mastro neniam, perdinte ĵusan emon al intimeco, trovu subulon kiu pensas ke ankoraŭ temas pri intimeco – kvankam, por paroli pi via Princo - intimeco ne tre verŝajnas”.

Jakto jam vidis la Princon de tempo al tempo dum la ĉiutaga rutino de la

Palaco, kaj ankaŭ ĉe ceremonioj: altan, malgrasan junulon kun nigra hararo kaj kavaj vangoj. Atinginte dudek jarojn, li nun rajtas pli grandan sekvantaron; tial oni aranĝis la transiron de Jakto el ĝenerala servo.

“Permesu prezenti, princa moŝto, vian novan lakeon”, anoncis la ĉefo de la persona sekvantaro, kondukinte Jakton en antaŭĉambron kie la Princo ĵus premis la sigelvakson sur faldita dokumento. Certiginte ke la rezulto estas kontentiga, li turnis sin kaj rigardis Jakton.

“Nomo?” li demandis.

“Jakto, via princa moŝto”.

“Bone”, diris la Princo, kaj returnis sin al la tablo.

Per tiu lakona bonvenigo Jakto akceptiĝis en la princan servon. Li staradis necerte dum lia nova mastro sigelis duan kaj trian dokumentojn. Poste la Princo murmuris ion al la viro staranta ĉe lia flanko kaj eklevinte unu el la dokumentoj, proponis ĝin al Jakto.

“Suskeno Abeldo en la gimdala ambasadejo”, li diris. “Ĉu vi konas lin?”

“Ne, via princa moŝto”.

“Negrave. Nur certigu ke vi metu tion en liajn manojn – nur liajn manojn. Komprenite?”

“Perfekte, moŝto”. Riverencinte, Jakto prenis la dokumenton, kaj lasis la ĉambron. Jen la unua tasko kiu kondukis lin ekster la Palaco! Li havis korlevan senton ke perspektivoj jam malfermas sin.

Ĉe la gimdala ambasadejo, lakeo kondukis lin en ĉambron flanke de la akcepta halo, kaj petis ke li atendu. Post kelkaj minutoj envenis mezaĝa viro kun griziĝintaj haroj kaj larĝa, bruna vizaĝo. Li rigardis Jakton suspekteme desub nigraj brovoj.

“Mi ne konas vin”, li diris.

“Ne, sinjoro. Mi estas Jakto Filde Korsan Trevo; mi ĵus transiris de ĝenerala servo en tiun de Princo Zefreno”.

“Hm! Vi portas lian livreon; pri tio ni povas esti certa. Tial, supozeble, oni enlasis vin, ne farinte demandojn. Ĉu oni faris demandojn?”

“Ne, sinjoro”.

“Ne, Sed ĉu la Princo diris ke vi venu, kvazaŭ laŭrajte, rekte al la ĉefa pordo serĉante min?”

“La Princo ordonis nur ke mi metu tiun ĉi dokumenton en la manojn de Suskeno Abeldo, sinjoro. Mi celis fari kiel eble plej rekte”.

“Nu, donu”.

“En la manojn de Suskeno Abeldo, sinjoro”.

“Do jen mi. Donu”.

“Kun respekto, sinjoro, vi ankoraŭ ne identigis vin kiel Suskeno Abeldo”.

“Kio? Kompreneble mi estas Suskeno Abeldo. Donu tiun dokumenton sen plia ĉikanado”.

“Kiel mi klarigis, sinjor – ”

“Damnu vian klarigon. De kiam mi devis kontentigi lakeon? Kial li diable ne sendis Vajon aŭ Frelon aŭ Stielon, homojn kun iom da favoro sub la bukloj – kiuj cetere konas min? Ne estu stulta: vi volis Suskenon Abeldon, kaj oni venigis min. Kiu do mi estu, se ne Suskeno Abeldo?”

“Mi ja ne scias, sinjoro, por esti sincera”.

“Sincera? Pli ĝuste, impertinenta! Ĉu vi intencas doni tiun mesaĝon? Se jes, donu. Se ne, reiru”.

Post abrupta kapklino, Jakto turniĝis kaj iris al la pordo.

“Kaj estu certa ke la Princo aŭdos pri via aroganto – kaj malobeo”,  
Abeldo laŭte promesis al la fermiĝanta pordo.

El la homoj kiuj estis en la ĉambro kie Jakto lasis la Princon restis sole la sekretario, Haleŝ Konfejro, kiam li revenis. Tiu rigardis la dokumenton ankoraŭ en la mano de Jakto, sed ne menciis ĝin, nur respondante al lia demando ke la Princo iris al lageto en la palaca ĝardeno.

Tie Jakto trovis lin sur la kajeto antaŭ marmora pavilono kie naĝemuloj kutimis vesti, kaj malvesti, sin. Li ĵus lasis la akvon, gajninte naĝkonkurson, kaj prenis bantukegon de unu el la gratulantoj kiuj ĉirkaŭis lin, dum du el liaj konkurintoj neatendite baraktis kun foka mallerto el la akvo sur la kajeton.

“Mirinda venko!” “Kia rapidego!” “Sed ne pli rapida ol eleganta!” “Vera oceannaskito!” “Kial konkuri kun tia naĝanto?” La Princo ignoris ĉiujn laŭdokriojn krom la lastan, kiu eligis el li sekan “Kial ja?” Tuj poste li haltis, ekvidinte Jakton, kiu sukcesis ŝovi sin tra la ĉirkaŭantan amason. “Via princa moŝto”, li vokis, “mi plej profunde bedaŭras ke mi ne povis liveri la dokumenton laŭordone”.

“Ne povis?” “Ne liveris laŭordone?” “Profunde bedaŭras? – kiel kompleze!” eĥis la voĉoj kiuj jam esprimis tian miron pri la princa naĝolerto.

“Silenton!” ordonis la Princo. “Venu kun mi”, li aldonis al Jakto, kiu sekvis lin en la pavilonon, kaj atendis dum la Princo malaperis malantaŭ kurteno kun la deĵoranta vestisto. La gratulintoj havis sufiĉan prudenton restadi ekstere, kaj Jakto staris atendante, provante konservi sian flegmon, ĝis la Princo reaperis, vestita, kaj kun pokalo en unu mano li etendis la alian, kaj Jakto senvorte transdonis la dokumenton.

“Vajo estas ekstere”, diris la Princo. “Venigu lin”.

“Vajo”, li diris kiam tiu aperis, “portu tion ĉi al Abeldo – ne: ne necesas kaŝiri; ĝi tute konvenas al lia ofico. Do”, li daŭrigis, turnante sin al Jakto kiam Vajo foriris, “vi ne povis liveri? Kial ne?”

“Mi ne povis konfirmi ke la homo kiu prezentis sin estas fakte Suskeno Abeldo, via princa moŝto”.



“Kial ne?” ripetis la Princo. “Ĉu li ne identigis sin? Ĉu oni ne prezentis lin? Kion li diris? Rakontu”.

Jakto priskribis kiel eble plej fidele la renkontiĝon en la gimdala ambasadejo, skrupule ripetante la argumentojn de sia kontraŭulo, inkluzive liajn grumblajn komentojn pri la princa elekto de sendito. La Princo aŭskultis sen komento. Poste, kun “Do reen al la Palaco!” li eliris, ignorante la scivolemajn rigardojn de la amaso ekstere, kiu nun sekvis lin, jukante sed timante fari demandojn, eĉ al Jakto, kiu rigardadis obstine antaŭen kun kunpremitaj lipoj.

Jakto neniam ekcertis ĉu la Princo aprobis, ĉu malaprobis, lian konduton rilate la neliveritan dokumenton. Sendito de Abeldo certe alvenis kun letero, sendube plendanta pri Jakto, kaj la Princo sendube legis ĝin, sed li nenion diris al Jakto. Vajo Filde Rieldor Tiso, lakeĉefo de la Princo, sciigis ke la Princo eĉ ne respondis al ĝi, kaj aldonis ke Jakto korekte agis, obstine rifuzante devii de la princaj instrukcioj, ke tion la Princo sendube ŝatas, sed ke Jakto ne atendu laŭdon pro tio, ĉar laŭdon li certe ne ricevos. Nur veterano en la princa servo scias interpreti liajn reagojn, Vajo sagace aldonis.

Jakto neniam havis okazon pruvi tiun aserton. Li servis malpli ol jaro en la princa sekvantaro kiam la Imperiestro mortis, la patro de la Princo heredis, kaj la Princo mem fariĝis heredonto, kaj tial Kronprinco. Antaŭ ol li povis kutimiĝi al siaj nova rango kaj respondecoj, io okazis kio determinis lian estontecon: la gereĝoj de Altajavujo celebris sian dudek-kvinan jubileon, kaj li devis ĉeesti la feston por reprezenti sian patron, kiu mem ne disponis tempon, pro liaj esploroj pri raportoj priskribantaj monstron en Lago Kurkuljo.

Ankaŭ ĉeestis la jubileon princo Ermad, reprezentanta sian fraton, la Ĉefreĝon de Dalfunto, kaj akompanis Ermadon lia sola filino, la princino Aŝkasara.

Tiu ĉi fierulino pasie amis sian patron, sian patrion kaj sin mem, kaj same pasie malamis sian patrinon, kaj ties naskolandon, Gimdalon, kie la

Princino devis pasigi grandan parton de sia junaĝo inter parencoj kiuj konstante pririkanis ĉion dalfuntan kiel krude provincan, inkluzive ŝian patron kaj, kvankam nerekte, ŝin mem. Nun la Princino traktis tiun landon kaj ĝiajn enloĝantojn kun humiliga amuzo kiam ajn la okazo prezentis sin. Pri la juglanda Kronprinco ŝi estis tute neŭtrala, ĝis ŝia ina intuo informis ŝin ke ŝi vekis en li pli ol ĝentilan intereson. Prudenta observemo informis lian sekvantaron pri la sama fakto, kaj la Princino ne estus flatita se ŝia ina intuo estus informinta ŝin kiom tio surprizis ilin, sed fakte ilian surprizon ne kaŭzis iu manko en ŝiaj ĉarmoj, sed simple la fakto ke tiuj, kvankam impresaj, sukcesis penetri la karapacon de ilia Kronprinco.

Dume, la Kronprinco ne manifestis la kutimajn simptomojn de sia aflikto: li ĝenis neniujn pri la unikaj belo kaj personeco de sia amata; li provokis neniujn al petolaj aludoj; li embarasis neniujn per prezento de la versprovoj al kiuj lia emocio inspiris lin. Anstataŭe, li silentis pri siaj sentoj, malkuraĝigante iujn aludojn al ili, ĝis li hejmenvenis kaj senkompromise anoncis al sia patro kaj ties konsilantoj ke li edzinigos la nevinon de la dalfunta ĉefreĝo aŭ li edzinigos neniun, eĉ se tio signifos la fruan formorton de la Zefreno-dinastio. Ĉar la sola alternativo al li kiel generonto de zefrenidoj estis lia pli juna frato, Ermuskero, eĉ la Imperiestro konstatis ke la situacio postulas diplomatian iniciativon, kaj senpacience deturnis sin de sia okupo aktuala – la eblo ke la legendaj juglandaj monstroj povus esti monstroj faktaj – sufiĉe longe por establi komunan deziron por pli fortaj ligiloj kun la reĝa familio de Dalfunto, kaj ekspedi delegitaron por finkonsenti la detalojn. La manko de obstakloj iom surprizis la delegitojn, ĉar finfine ili ne povis scii kiom la Princino instigadis sian indulgeman patron akiri la ĉefreĝan aprobon por edziniĝo tiel avantaĝa al princino kies ĉefa ambicio estis spiti gimdalajn parencojn kiuj arogas kredi ke ŝi – la princino Aŝkasara! - honoriĝus pro edziniĝo al iu ano de la gimdala aristokrataro.

Estis interkonsentite ke la geedza festo okazu la venontan jaron dum la frua somero, kaj – kun nur iomete pli da diskuto – ke la Princino vojaĝos pere de Altavajujo, la lojala kliento de Juglando, al la juglanda landlimo, kie la Kronprinco bonvenigos ŝin al Juglando, kaj eskortos ŝin al la ĉefurbo, Kerno.

Jakto antaŭvidis la vojaĝon al la altavajuja landlimo kun plezuro, ĉar li ne akompanis la Kronprincon al la jubileo, kaj li tre deziris denove vidi la mondon ekster la ĉirkaŭaĵo de la Palaco, sed liaj aspiroj al pli vastaj horizontoj denove abortiĝis; du tagojn antaŭ la dato de la aventuro la Kronprinco venigis lin por anonci: “Vi servadis min jam dum kelka tempo, sed ne tiel longe ke vi ne kapablas facile adaptiĝi. Tial mi decidis ke vi servados la Kronprincezinon”.

“Moŝto?”

“Kiel ŝia persona lakeo. Ŝi bezonos viron al kiu ŝi povos konfidi taskojn ne konvene plenumoblajn de ŝiaj inoj aŭ sekretariaro”.

“Granda honoro, kronprinca moŝto, por esti –”

“Kompreneble. Do meritu ĝin. Vi ĉeestos prezenton, kune kun la alia juglandaj servistoj de ŝia moŝteco, en ŝia buduaro”.

“En ŝia buduaro, moŝto?”

“En ŝia buduaro”.

Jakto ankoraŭ ne plene orientiĝis kelkajn tagojn poste, kiam li staris atendente inter la juglanda duono de la princina sekvantaro. Ili jam delonge aŭdis ŝian alvenon, sed la oficiala akcepto okazadis sube, en la aŭdienca aŭlo, kien oni sukcesis venigi la Imperiestron por formale bonvenigi la fianĉinon de sia plej aĝa filo. Tie ŝi ankaŭ prezentiĝis al diversaj funkciuloj, inkluzive Ajrena Flinde Amelda Kreŝ, ĉefino de la servistaro apartenanta al la kronprincaj aloj de la Palaco.

Fine la sono de voĉoj alproksimiĝis al la buduaro, la pordo malfermiĝis, kaj la Kronprinco envenis, kondukante sian fianĉinon, kun aro de korteganoj kaj servistoj malantaŭ ili. Inter tiuj estas ĉefservistino Ajrena, kiu nun komencis prezenti la aliajn servistojn unu post alia.

Jakto scivole ĵetis diskretajn ekrigardojn al sia nova mastrino dum ŝi malrapide alproksimiĝis al li laŭ la vico de servistoj kaj lakeoj. Trafis lin ŝia alto kaj, kiam ŝi fine atingis lin, ŝia rigardado, kiu ne deturnis sin de lia

vizaĝo, eĉ dum Ajrena donadis konvenan informon, kaj la Kronprinco murmuris ion aldonan.

“Mia persona lakeo?” ŝi fine ripetis, ankoraŭ ne forturnante la rigardon de Jakto. La alparolitoj respondis ke jes, kaj la Kronprinco plue klarigis: “Lakeo, agento, peranto – laŭ via bontrovo. Viro al kiu vi povos konfidi komisionojn – nu, ĉiajn ajn taskojn – kiujn vi ne povos, aŭ ne volos, konfidi al aliuloj”.

“Kial ne?”

“Nu, kiu scias – nun? Sed kiam vi ja scios, tiam – jen li! Centprocente diskreta!”

“Jakto, ĉu?”

“Jes, via kronprincdzina moŝto”.

“Kaj kiam *mi* ja scios, ĉu ankaŭ *vi* scios?”

“Mi petas, moŝtino?”

“Ĉu vi scias jam nun ke kiam mi bezonos viajn servojn kiel persona lakeo, vi scios kiel liveri?”

“Nu, jes, moŝtino”.

“Kiel?”

“Dependos de la cirkonstancoj, moŝtino”.

“Ho ve `Dependos`, ĉu? kaj mi atendis certon”.

“Kun permeso, moŝtino, mi estas certa jam nun, ke kiam vi bezonos la servojn de persona lakeo, mi liveros. Mi scios precize kion kiam mi scios la precizan bezonon”.

“Hm. Mi garantios la precizon; do la scio ne dependu”. La Kronprincdzino plueniris, lasante malantaŭ si personan lakeon nerve elĉerpitan. Li devis konscie kunteni sin dum ŝia inkvizicia demandado,

strebante asertadi sian valoron, tamen ne estante impertinenta, konsciante la tutan tempon ke la Kronprinco aŭskultas ĉion – tiu enigma homo kiu honoris lin per la asigno al tia posteno, kaj nun per tiu senkompromisa rekomendo –“Centprocente diskreta”! De la Kronprinco!?

Kiam Aŝkasara fine liberiĝis de bonvenigaj ceremonioj, aŭdiencoj kaj tiel plu, ŝi rekomencis la klopodojn kiujn ŝi jam komencis antaŭ ol lasi sian hejmlandon ekscii kiom eble plej pri la palacaj moroj, intrigoj kaj personoj. Ŝi toleris la sencerban babiladon de korteganoj en ŝia ĉeesto, esperante kribri orbuletojn de informo el la skorio de ilia konversacio. Ŝi kuraĝigis la klaĉadon de siaj frizistinoj kaj vestistinoj, konjektante ke ia vereto devas iam elfali. Ŝi observadis la ĝeneralan konduton en apartaj cirkonstancoj kaj la tipajn reagojn al diversaj raportoj kaj anoncoj. Foje ŝi simple faris rektan demandon al sia nova edzo.

Pri li ŝi estis pli ol kontenta. Kiam ĉe la jubilea festo en Altavajujo, li bruske anoncis ke li volas edzinigi ŝin, ŝi tuj – almenaŭ *mense* tuj – akceptis, ĉar tia edziniĝo alportos potencon kaj prestiĝon kiujn ŝi bone sciis elprofiti; sekve, ŝi estis preta akcepti la malavantaĝon de malsimpatia edzo por akiri ilin, sed fakte eĉ lia lakona propono inkluzivis la neoriginalan sed – en dinastia geedziĝo – signifan frazon “se vi ne kontraŭas”. Nun ŝi trovis lin seka, skeptika, eĉ cinika, sed al ŝi persone li ĉiam montris respekton tian kian li koncedis al neniu alia, inkluzive la Imperiestron. Li ne dividis ŝian singardeman sintenon al la estonteco, sed ne malhelpis ŝiajn aktivojn tiurilatajn, kaj kvankam ŝi ne dividis lian skeptikismon, ŝi tamen admiris, kaj ekimitis, la senkompromisan forigon de eŭfemismo kaj blago el lia konversacio, ĉar kio povus esti kruda ĉe subulo, tio estis, laŭ ŝi, aparte konvena al princo.

Dume ŝiaj diligentaj aktivoj por konservi la dinastion havis klaran celon: ŝi intencis esti la patrino de la Imperiestro de Juglando, imperiestro kiu regos laŭ ŝia konsilo, ne laŭ la persvadoj de iuj ambiciaj manipulantoj tiaj, kiaj infestas ĉiujn kortegojn. Kompreneble, la sukceso de ŝiaj aspiroj dependis de konvena nasko, sed dum ŝi ne povos absolute influi tion, ŝi klopodis influi ĉion influeblan.

La unua ero en ŝia programo estis identigi eventualajn subfosontojn de sia volo inter la homoj kiuj ĉirkaŭas ŝin; tio estas korteganoj kaj la juglanada duono de ŝia servistaro (pri la dalfunta duono ŝi jam estis kontenta). Ĉe ŝiaj servistoj estis neniu rimarkinda, sed aŭskultante al la korteganoj, ŝi aŭdis unue dubindan, sed poste tre klaran, komplimentan esprimon pri Gimdalo. Ĝi venis de unu el siaj sinjorinoj akompanantaj, Hifajna, Grafino de Ŝaratreo. Aŝkasara subpremis koleran riproĉon kaj aŭskultis atente sed senkomente dum kelkaj tagoj, nur unufoje farante kvazaŭ hazardan aludon, kiu eligis pluan, ne miskompreneblan, panegireton.

Tio sufiĉis. “Mi havas problemon”, ŝi informis la Kronprincon. “mi suspektas ke unu el miaj sinjorinoj akompanantaj estas perfidulino – certe ne lojala”.

“Sinjorino akompananta?” eĥis la Kronprinco. “Tio estas iom embarasa. Servistinon vi povus maldungi, sed sinjorino akompananta! Vi devos esti certcerta. Kiu estas?”

“La grafino de Ŝaratreo”.

“Hilfajna! Ĉu vi estas certa? Ŝi estas, kiel la plejmulto, stulta, frivola kaj flatemaĉa – sed mallojala? Ĉu ŝi havas sufiĉan cerbon? Sufiĉan intereson pri io krom sukeraĵoj? Kion ŝi faris suspektigan?”

“Nenion, laŭ mia scio, sed kelkaj el ŝiaj diroj - mi ne povas diri ĝuste kial, sed ili maltrankviligas min, kaj nun, post du tri- tagoj ŝi lasos la kortegon por ferii ĉe Kulkaŭ – ”

“Ha jes, estos multnombra gastaro ĉe la imperia ĉasvilao tie”.

“Inkluzive grupon de Gimdalo. Kiel mi diris, mi ne fidus ŝin, kaj perturbas min ke ŝi estos tie sen mia kontrolado, ĉar mi mem ne povos iri je la momento, kaj mi ne povas malhelpi ke ŝi iru”.

“Kompreneble ne. Do sendu Jakton”.

“Kio?”

“Ne `kio?` `Kiun?` Fakte, Jakton – la lakeon kiun mi transdonis al vi”.

“Ha jes, kiel mian personan lakeon. Mi ĝis nun ne havis okazon utiligi lin”.

“Des pli bone. Li ankoraŭ rekoniĝos simple kiel unu el viaj ordinaraj lakeoj. Do li povos iru kun la servistaro de mia kara frato Ermuskero – ne, pli bone; li akompanu grupeton kiun mi antaŭsendos kvazaŭ por fari preparojn kontraŭ mia eventuala iro tien”.

“Sed kion li povos fari tie?”

“Aŭskulti, rigardi, registri. Kion vi mem povus fari?”

“Nu, efektive, eble nenion pli je ĉi tiu konjunkturo, sed mi estus pli trankvila se mi povus esti tie”.

“Kaj pli-malpli estos tie – pere de li. KREDU min, li komprenos kion vi bezonas, kaj estos kvazaŭ via alia vio”.

Aŝkasara ne estis tute konvinkita ke peranto kapablos aŭskulti, rigardi kaj registri tiel efike kiel ŝi mem, sed ŝi respektis la opinion de sia edzo, kaj finfine ne estis alternativo. Cetere, ŝi jam intencis krei tian spionaron kian eĉ ŝia neambicia kaj konfidema patro opiniis necesa en la dalfunta kortego, kaj ŝi supozis ke tiu ĉi JAKTO, “ŝia persona lakeo” adekvatos kiel unua ero. Ŝi aranĝis privatan intervjuon.

“JAKTO”, ŝi diris kiam tiu staris antaŭ ŝi, mi havas por vi asignon, sekretan kaj – iom delikatan. Mi volas ke vi iru al la ĉasvilao ĉe Kulkaŭ kvazaŭ servisto preparanta la ĉambraron de la Kronprinco tie kontraŭ eventualo, sed fakte vi kontrolos la aktivojn, kaj kiel eble plej, la dirojn de la Grafino de Ŝaratreo, kaj notos ĉion iel signifan por raporto al mi. Vi komprenas ke ĉio ĉi estas absolute konfidenca, ĉu ne?”

“Perfekte, via kronprincezina moŝto”.

“Bone. Ĉu estas io kio estas neklara?”

“Mi povus des pli kontentige plenumi, moŝtino, se konvenus indiki tiaĵon

kia estus aparte signifa laŭ via moŝtina opinio”.

“Kiel mi povos scii tion ĝis mi ricevos la koncernan informon?” lia mastrino demandis iom akre. Pikis ŝin ke subulo demandu pli ol ŝi emis sciigi, sed kompreneble ŝi devos fidi lin, kaj cetere li pravis. “Nu, efektive”, ŝi aldonis post paŭzo, “mi aparte volas scii kiel ŝi interrilatas kun la gimdalanoj tie, kaj ĉion kion ŝi diros pri Gimdalo aŭ gimdalanoj – laŭ via povo aŭdi. Se io vin trafos kiel urĝa – pro iu ajn kaŭzo – ne hezitu sendi mesaĝon. Ĉu vi komprenas?”

Jakto certigis ke jes, kaj je tio lia mastrino devis kontentiĝi, provizore rezignante pri ia persona kontrolado, sed estis nur kun malfacilo ke ŝi povis koncentrigi siajn pensojn pri aliaj aferoj dum la periodo de la ĉasaktivoj ĉe Kulkaŭ. Neniu mesaĝo venis de Jakto; do ŝi devis supozi ke li ne rimarkis ion aparte signifan, sed ĉu tio signifas ke nenio aparte signifa okazis? Ŝi atendis lian revenon senpacience, kaj tuj post la realveno de la ĉasintoj kun iliaj sekvantaroj al la Palaco, ŝi ordonis lian ĉeeston.

“Nu, kion vi havas por mi?” ŝi demandis, rigardante la paperojn en lia mano.

“Mi aranĝis mian raporton en du partoj”, kronprincezina moŝto,” Jakto respondis: “diroj kaj aktivoj”.

“Do restu dum mi legos”. Aŝkasara prenis la faskon, kaj eksidiĝinte ĉe sia skribotablo, komencis studadon de la sufiĉe abundaj folioj. La unuan duonon ŝi legis atente; poste ŝi komencis rapidlegi, kaj fine ŝi senpacience trafolumis, lasante la vortojn preterflugi sian rigardon, kun espero ke io signifa trafos. Poste ŝi rigardis al Jakto.

“Eĉ ne unu vorto pri Gimdalo,” ŝi diris. “Eĉ ne unu konversacio kun la gimdala grupo. Ĉu jen ĉio? Devis esti io. Eble kiam vi malestis, ĉu?”

“Eble, moŝtino, sed ne tre verŝajne. Mi observis ŝin, aŭ la grupon, preskaŭ ĉiuminute dum mi vigladis, kaj mi vigladis pli longe ol ili. Cetere, mi subaŭskultis la konversaciojn de ŝiaj servistoj, kaj foje alparolis ilin, je unu okazo kvazaŭ hazarde supozante ke, por monduma sinjorino kiel ŝi,



sendube estas plezuro renkontiĝi kun alilanduloj, kiel ekzemple la gimdalaj gastoj ĉi tie, sed tio stimulis nur ŝultrolevan indiferenton, krom ke unu el ili demandis kun milda surprizo kial mi supozu ke ilia mastrino estas kosmopolitino, krom gastronomino”.

“Sed ĉu ŝi neniam eĉ menciis ilin – gimdalanojn?”

“Unufoje, moŝtino; sur paĝo tri eble via kronprincdzina moŝto rimarkis ke ŝi aludis ilin ĉe bonveniga bankedo”.

“Hm, jes”. Trovinte la lokon, la Kronprincdzino laŭtlegis: “Mi vetas ke tiuj gimdalanoj atendis pli prestiĝan tablon`. Ne multon efektive! Kiel ŝi diris ĝin? Kun riproĉemo? Triumfe? Sarkasme?”

“Iomete de la du lastaj, moŝtino, kun iom da ŝajna amuzo”.

“Kaj jen ĉio? Eksterordinare! Mi ne komprenas. Ĉu eble malŝparo de tempo? Nu, eble ne”, ŝi murmuris al si. Mi supozas ke ni eksciis ion, se nur ion negativan”.

“Kun permeso, kronprincdzina moŝto”.

“Jes?”

“Estis io alia kiu eble interesos vian moŝtecon”.

“Do?”

“Sciante ke interesas vian moŝtecon la gimdalaj gastoj, mi opiniis prudente amikiĝi kun lakeino deĵoranta ĉe ilia tablo, kaj iam rimarkinte ke ili multe rigardas princon Ermuskeron, mi poste demandis pri kio ili ĝuste tiam parolis, petole sugestante ke ŝia `tablosilento` estas nur preteksto por kaŝi forgesemon, ĝis ŝi fine donis kiel eble plej laŭvortan priskribon”.

“Kaj?” Aŝkasara sin klinis antaŭen jam ne kaŝante jukan scivolon.

“Nur du fragmentojn, moŝtino: la unua estis ` - - - ke ni perdas bonan okazon, eĉ se li estas ankoraŭ iom juna”, kaj, responde al tio, ` - - - Ni havas nek la rangon, nek la prestiĝon por profite trudi nin. Pli utile observi kaj raportu; ni jam povas certigi ke li estas - ` - pardonpete, moŝtino! -

`idioto. Tia informo estos utila - - -`. Jen ĉio, kion mi povis eligi, moŝtino”.

“Ĉio? Ĝi preteras la tutan enhavon de ĉiuj tiuj risoj” – ŝi gestis al la raportoj nun kuŝantaj sur ŝia pupitro. “Jes, tio certe interesas min. Jen la frukto de iniciativo – lakeino, ĉu? Mi esperas ke nenio maldeca okazis. Ne? Bone. Kvankam por tia ĉi informo - - - Nu, restas nur certigi ke tio ĉi ne disvastiĝu. Vi komprenas, ĉu ne?”

“Certe, moŝtino”.

“Do eĉ ne per plej arkana aludeto menciu ĝin”.

“Mi jam ne memoras kion mi ne menciu, moŝtino”.

“Ha, jen memoro taŭga por mia persona lakeo! Bone farite, Jakto! Do iru vi nun, kaj mi kribros viajn raportojn por eventualoj – ne, restu momenton! Diru: kio estas via propra opinio pri la Grafino de Ŝaratreo?”

“Pri la Grafino de Ŝaratreo, moŝtino?”

“Jes, sincere – kvazaŭ inter kvar okuloj”.

“Sincere, moŝtino?”

“Jes, Jakto, sincere. Ne ripetu ĉion kion mi diras. Alie, mi revizios mian ĵusan opinion”.

“Mi pardonpetas, moŝtino. Se mi scius pri kiu karakterizo de la sinjorino mi parolu: ĉu pri aparta sinteno ŝia, ĉu ŝia belo – ”

“Belo?!”

“Nu, efektive, moŝtino, beleco ne reliefiĝas inter la atributoj de ŝia grafina moŝto. Mi nur menciis tiujn hipotezajn – ”

“Sufiĉe! Vi scias tute bone kion vi devis kontroli ĉe Kulkaŭ. Kiaj estis ŝiaj sintenoj al Gimdalo, al mi kaj al la Kronprinco. Krom la malmulto en via raporto, vi devas havi iun ĝeneralan impreson. Kio estas via sento? - intuo se vi volas? - kaj ne komencu per `Intuo, moŝtino?`”

Tiel avertite, Jaktio momente hezitis antaŭ ol respondi: “Nur ke la Grafino ne havas pozitivan sintenon pri Gimdalo, moŝtino, kaj al viaj kronprincaj moŝtoj nenion pli ol deziron plaĉi.”

“Tio estas tre negativa. Vi rajtas paroli tute malkaŝe”.

“Mi ja faris, moŝtino. La negativeco venas ne de mi, sed de la Grafino: ŝi ne havas – se mi vere rajtas paroli malkaŝe – ”

“Jes, jes, daŭrigu”.

“Do por esti sincera, moŝtino, ŝia grafina moŝto ne havas tion en la kapo kio generas sintenon sufiĉe pozitivan por interesi vian moŝtecon”.

“Ĉu vi volas diri ke ŝi estas stulta?”

“Kun via kronprincezina permeso”.

“Strange, mia edzo – la Kronprinco - diris samon, pli-malpli”. Aŝkasara paŭzis penseme. “Sed,” ŝi daŭrigis, “tiuokaze kial Gimdalo tiel interesas ŝin? Mi aŭdis plurfoje, per propraj oreloj, kiel ŝi senkaŭze laŭdadas ĝin. Kial? Kaj kiom ofte ŝi faras samon kiam mi ne ĉeestas?”

“Kredeble neniam, moŝtino”.

“Kio? Kiel vi scias – ne, konjektas - tion?”

“Ĉar ŝi tiam ne havas motivon, moŝtino. Kompreneble, mi ja nur konjektas, sed mi volonte vetus – ”

“Ne en mia servo!”

“Kompreneble ne, moŝtino. Mi uzas la terminon nur por emfazi –“

“Bone, sed kial vi konjektas ke ŝi ne havas motivon?”

“Ĉar mi kredas ke ŝi celas flati, moŝtino, kaj por tio necesas ke vi aŭdu. Kompreneble, estus tro krude malkaŝe laŭdi vin, aŭ eĉ la dalfuntan imperian familion, sed sciante ke via honorinda patrino estas gimdalino, ŝi celas nerekte, kvazaŭ hazarde, flati vin, laŭdante Gimdalon”.

“Flati min!?”

“Jes, moŝtino, kvazaŭ forgesante ke vi estas gimdala princino, ŝi neintence, por tiel diri, flatas vin. Kiel mi diris, ŝi nur volas plaĉi, kaj por ŝi tio ĉi estus subtila – “

“Plaĉi? Estas io, kion vi, kiel mia persona lakeo, devas scii, Jakto: kiu volas flati min, tiu trovu ion pli indan je laŭdo ol tiun pustulon sur la surfaco de la tero”, la Kronprincedzino furioze atentigis, “kiel via lastatempa komisio devis sugestii al vi. “Tamen,” si daŭrigis pli milde, “via interpreto de ŝia motivo estis percepta, kaj kune kun via iniciativo ĉe Kulkaŭ, kiu alportis tian signifan informon, sugestas ke mi akiris personan lakeon kiu vere utilos. Jes, vi plaĉas al mi, Jakto - malgraŭ via emo ripeti miajn demandojn, kaj fari malkonvenajn aludojn al vetado. Do, sufiĉon por la momento! Iri vi, kaj mi pli detale studos vian raporton”.

Jakto obee iris, sed ŝi ne studis lian raporton. Anstataŭe ŝi pensis, pensadis pri ĉio kion ŝi ĵus aŭdis, kaj grade aranĝis la kirliĝintajn impresojn en ordon taŭgan por disciplinita analizo.

Ŝi facile konstatis ke ŝi tro impete eksuspektis: pro nura flataĉemo, kiun ŝia edzo senpene perceptis kaj ŝia lakeo konfirmis, ŝi pretis disipi ŝiajn ankoraŭ ne tro abundajn rimedojn por vanta spionoperacio. Ŝi ankaŭ konstatis ke nur hazardo, kaj la iniciativo de ŝia sendito, prosperigis la operacion, malkaŝante ke ia gimdala komploto ja ekformiĝas, kaj ke ĝi ekspluatos ŝian bofraton, Ermuskeron. Fine, ŝi eksciis ke tiu ĉi persona lakeo nun en ŝia servo estos valora ilo por la luktoj venontaj, kondiĉe ke lia lojalo egalos liajn iniciativon kaj inteligenton.

\* \* \*

**K**iam la edzino de la Kronprinco de Juglando naskis fileton, la kortego kaj popolo celebris la eventon per ferioj kaj festoj, preĝoj kaj drinkado. Eĉ la Kronprinco permesis al siaj trajtoj heliĝi, kaj – eĉ pli eĉece – la Imperiestro vizitis la patrinon kaj bebon kvankam tio interrompis liajn

esplorojn pri levjatano kun masiva korpo kaj serpenta kolo, kiun ŝipanaro de galero pretendis vidi en la Maro de Mirmir dum ĵusa vojaĝo.

Tamen nenies ĝojo egalas tion de la naskintino: per edziniĝo al la Kronprinco, Aŝkasara jam malfermis al si ireblojn kiuj povus konduki al realigo de ŝiaj plej ambiciaj esperoj, kaj nun, kun filo destinita fariĝi imperiestro, la vojo estis klare difinita. Krom prizorgi lian sanon, nur necesos anticipi komplotojn malhelpi lian glatan transigon de princeto al heredonto de imperiestro, kaj ŝi jam tiucele kreis maŝaron de observantoj kaj informistoj, organizon kiu kreskis rapide post la raporto kiu indikis la gimdalan intereson pri princo Ermuskero - des pli rapide pro amasa rekrutigo de la kronprinca spionaro, kies intrigojn kaj raportojn li mem toleris pli ol iniciatis; li preferis pretigi sin por monarkiĝo per diskutoj, ekzercoj kaj studado. Pri eventualaj komplotoj li ŝajne ne ĝenis sin, kaj Aŝkasara foje sentis ke li rigardas la eblon ke li neniam pluvivos por heredi kun ironia indiferento. Li senhezite konsentis ke ŝi utiligu liajn agentojn kiel siajn proprajn, kaj – dank` al lia apatio – tiaj ili praktike fariĝis.

Ŝi ankaŭ rekrutis anojn el sia propra sekvantaro, foje nur por unu asigno, foje kiel permanentaj observantoj, kaj fine, post konsiliĝo kun siaj profesiaj agentoj, ŝi subaĉetis anojn de alies sekvantaroj, kaj eĉ ambasadejoj. (Ŝi eksciis kun ĝojo ke Sukeno Abeldo, unu el la plej spertaj kiujn ŝi heredis de sia edzo, deĵoras en la gimdala ambasadejo).

La nova princeto montriĝis sana kaj energia, kun fortikaj pulmoj kaj voĉo kiu laŭnecese penetras tri etaĝojn. Ĝi iom moduliĝis kiam li eksciis paroli, ĉar laŭto malpli necesis kiam li kapablis voĉigi postulojn kiujn amema patrino indulgos, spite patrajn dubojn.

Tamen tiu por la princeto tre kontentiga situacio daŭris nur ĝis la indulgema patrino prezentis al li ion kion li ne postulis; nome, fratineton. Li des pli domaĝis ties alvenon ĉar lia patrino tiom okupiĝis pri ĝi ke ŝi ne nur ĉesis indulgi lin, sed eĉ ne rimarkis lian paŭtemon, dum lia patro kompreneble indiferentis pri ĝi, kaj fakte kaptis la okazon iom moderigi la troan indulgon kiu, laŭ li, malutilos al la temperamento de sia fileto. Li ne malŝparis tempon per admonoj kaj virtaj aforismoj, sed instigis la knabeton al mensa kaj fizika strebado per konvenaj premioj kaj punoj, kaj nur de tempo al tempo, kvazaŭ flanke, aludis al devoj kaj sintenoj

estimindaj ĉe princo. Lia fileto nek rezistis, nek ĉikanis, ĉar la silentemo kaj la seka, foje morda, parolmaniero de lia patro tiom impresis kaj mistifikis lin, ke li neniam volis eltrovi kiel tiu ĉi enigma persono reagus al kaprico kaj malobeo.

Fakte, li eĉ flatiĝis pro la atento kiun li ricevis de tiu impona, aŭtoritata figuro, eminentegulo al kiu eĉ lia patrino montris respekton, kaj plaĉis al li imagi ke se li sekvos la instruon kaj konsilon kiun li nun ricevas, li fariĝos same impona kiel lia instruisto. Sekve, li senĉikane rezignis sin al tiu ĉi rigora reĝimo, ĝis ĝi fine mildiĝis sub la reviviĝinta influo de lia patrino.

Sukcese lanĉinte la novan principeton, Aŝkasara povis reokupi sin ne nur pri sia filo, sed ankaŭ pri la akumuligintaj raportoj de sia spionaro, kiujn ŝia edzo senĝene neglektis dum ŝia akuŝado. Plej interesa ĉerpo venis de informantino kiun Suskeno Abeldo sukcesis enigi en la hejmon de Ildin Picito, gimdala markizo kiu apartenis al koterio dediĉita al la disvastigo de gimdalaj influo kaj kulturo tra la mondo perkulte, kaj perarmile se eventualo postulos. Aŝkasara jam sciis pro ŝia restado en Gimdalo ke ĝia apelacio al internaciaj instancoj por agnosko de ĝia kulturo maskis malignan envion pri Juglando, kies detruon ĝi celis, kaj ŝi ankaŭ sciis ke kelkaj el tiu intense ŝovinisma grupo akompanos ambasadon kiu alvenos Juglandon samtempe kiel gimdala komerca komisiono.

La vizito de la komisiono aranĝiĝis pro aŭtenta celo; nome, la du landoj kunsentis la dezirindon intertrakti pri certaj koncesioj, sed la ambasado estis pli ĝuste vizito kiun la vizitontoj mem porpetis – iniciaton facile komprenatan en diplomaciaj rondoj, kiuj ja bone konis la malinklinon de la Imperiestro ĝeniĝi pri akceptaj ceremonioj, sed al Aŝkasara ĝi estis sintrudo minaca, ĉar ĝi duobligos la nombron de gimdalanoj en, kaj apud, la juglanda kortego. Kaj nun – vere perturbaj por ŝi! - la vortoj per kiuj, laŭ la informantino, la markizo adiaŭis iujn gastojn siajn: “Nu, korvido sen korvo tamen korviĝos, sed korvo sen ido eĉ iĝon ne kovos”. Liaj aŭskultintoj ridante konsentis, kaj unu el ili aldonis ke al ido nur ioto necesos por maturigi iliajn aspirojn. Ili sendube supozis ke servistino ne interpretos tiujn arkaĵojn, kaj pri tio ili pravis, sed instruitino de Suskeno Abeldo sciis ke ŝi ne devas kompreni; sufiĉas liveri al sia mentoro precizan laŭvortan raporton de io suspektinda kaj lasi al li interpreti. Tion li nun ja faris, kaj certigis ke la vortoj kaj sugestita interpreto atingu la

Kronprincedzinon, kiu ja ne bezonis helpon interpreti. “La korvo” aludis ŝian edzon, kies kortega kromnomo estis certe konata al similaj rondoj eksterlande; do estis facile diveni la signifon “sen ido” kiel ankaŭ la identecon de la “id – ioto” kiu maturigos iliajn aspirojn.

Ŝi tuj informis la Kronprincon, kaj li, malgraŭ lia amuzo pri Ermuskero kiel Imperiestro, agnoskis la minacon en la vortoj al ilia fileto. “Ĉiuokaze”, li diris, “ni devas supergardi la knabon”.

“Kaj vin,”

“Kaj min, sed mi jam delonge spitadis intrigojn kaj perfidemon. Aliflanke, nun – ĝuste nun – ili opinias la knabon atingebla. Ni devas scivoli kial – kaj ekprepari nian defendsistemon. Kiel deirpunkto, kontrolu viajn servistojn.”

“Mi faris antaŭlonge, kaj nun senrezerve fidas ilin”.

“Fidu neniun. Dume, mi aranĝos ke specialaj anoj de la palaca gvardio kvazaŭ hazarde aliĝu al la sentineloj en la ĉirkaŭaĵo de la knabo, kaj reorganigos niajn servistarojn dum tiu ĉi vizito, tiel ke aliaj anoj de la gvardio povu diskrete enfiltriĝi”.

La vortoj de la Kronprinco eĉ pli perturbis Aŝkasaran. Li pravis: kial tiuj homoj tiel certas ĝuste nun ke la Princeto atingeblos? Ĉu efektive estas perfidul(in)o en ŝia sekvantaro? Ŝi ne povis kredi tion, post tiom da skrupulegaj kontroloj kaj kontraŭkontroloj, sed ŝajne estas ia malfortaĵo en la sistemo. Kiel kontraŭi tion? Kiel pli sekurigi la Princeton? Ŝi sentis ke necesas iu devizo aldona al pasiva gardado.

“Jakto”, ŝi diris, “vi havas neveton kiu aspiras eniri la Servon, ĉu ne?”

“Jes, moŝtino. Ĉosto, filo de mia fratino. Mi preparadas lin jam nun, kvankam li ne eniros la Servon ĝis post du jaroj”.

“Alivorte, li nun havas dek jarojn, ĉu?”

“Preskaŭ, moŝtino”.

“Li estas iom malgranda, eĉ kiel dekjarulo, laŭ mia memoro”.

“Nu jes, moŝtino, sed tio estas kutima en nia familio: ekkresko okazas subite. Ni certe atendas ke li estos sufiĉe kreskinta por eniri palacan servon post du jaroj”.

“Eble li povos eniri mian propran jam nun”.

“Moŝtino?”

“Mi pensas pri tiu eblo. Povus esti avantaĝe akcepti infanon kiu kreskos kaj maturiĝos en mia persona servo, kaj eventuale en tiu de la Princeto, kondiĉe ke li estos taŭga”.

“Tio estus granda honoro, moŝtino.”

“Kompreneble. Kiel mi diris, mi pensas pri la eblo. Li devus havi senmankan fonon, kaj tial mi pensis pri via nevo, ĉar li ja estas via nevo, kaj kompreneble via familia konekso kun la Palaco estas ampleksa kaj senmanka. Do nur dependos de la kvalitoj de la knabo mem”.

“Li estas tute promesplena en ĉiuj rilatoj, moŝtino. Li jam scias kiel kondukti en ĉeesto de superuloj, kiel fermi siajn orelojn kontraŭ tio kio ne koncernas lin, kaj large malfermi kiam - ”

“Jes, jes, Jakto, mi estas certa ke li estus ĉiurilate modela lakeo. Dume, mi volas vidi lin. Morgaŭ post matenmanĝo. En mia buduaro”

Kiam la iom mistifikita Jakto informis sian fratinn kaj ŝian edzon pri la kronprincezina decido, ili ne sciis ĉu ĝoji pro la honoro, ĉu lamenti pri tiel frua perdo de sia fileto. Tiu mem komence fieregis, bildigante sin en imperia livreo paradantan antaŭ siaj amiketoj kiam li hejmenvenos dum liberaj horoj; poste, li ekpensis pri la morgaŭa intervjuo, kaj lia ventreto ekdoloris pro nervozo.

Lia onklo neniel provis malpliigi tiun nervozon; pli gravis al Jakto ke la noviceco ne malhonorigu la familian nomon, por ne mencii lin mem.

“Memoru, Ĉosto”, li urĝis, “ke morgaŭ vi renkontos ne nur eminentan personon, sed la ĉefan sinjorinn en la lando, kiu iam estos nia



Imperiestrino. Zorge atentu ĉion kion ŝi diros, kaj respondu klare kaj korekte, kiel mi vin instruis, kaj neniam interrompu ŝin. Kiam ŝi indikos ke la intervjuo estas finita, ne provu komenci konversacion – tio estas, ne provu diri ion plu; riverencu senvorte, kaj diskrete retiru vin. Ĉu vi komprenas? Ĉu vi memoros ĉion ĉi?”

“Jes, onklo Jakto, sed mi ĵus pensis - eble ni ne iru morgaŭ, ĉu? Eble iom poste estus pli—”

“Ĉosto, vi devos tre rapide lerni ke kiam la Kronprincezdino ordonas, ni obeas. Kiam ŝi diras `ĉeestu`, ni sen ajna dubeto ĉeestos; kiam ŝi diras `morgaŭ` estas egale certe ke ni ĉeestos morgaŭ. Ni eĉ ne pensos pri aliaĵo”.

La postan matenon Ĉosto eniris la palacon kiun li tiel ofte vidis deekstere. Li eniris kun lia onklo tra flanka pordo, kaj komence rimarkis nenion eksterordinaran krom la alto de la koridoraj plafonoj. Tamen, ili baldaŭ venis al pordo kovrita de verda repso, kaj trairinte trovis sin en tute alia mondo: marmora ŝtuparo kondukis al koridoro kies kolorriĉajn murpentraĵojn interpunkciis, krom niĉoj kun bustoj kaj statuoj, serio de solidaspektaj pordoj antaŭ kiuj silentaj lakeoj postenis, dum de la delikate farbita bluo de la plafono pendis lustroj kies kristalaj facetoj refraktis eĉ la ordinaran taglumon en multkolorajn radiojn.

Ĉe la fino de tiu ĉi koridoro frontis ilin alta duobla pordo, blanke farbita, kun oraj folidesegnoj ĉe la randoj de la paneloj. Ĝin flankis du gvardianoj, kaj antaŭ ĝi staris la kutima lakeo. Jakto alparolis lin, kaj kapjesante li malfermis pordon por diri ion al iu interne antaŭ ol indiki ke ili eniru. “Atendu tie”, li diris, kaj reiris al sia posteno.

Ili trovis sin en ronda, preskaŭ senmebla, ĉambro. Kontraŭ ili pordo fermiĝis, sendube malantaŭ la persono al kiu la lakeo parolis. Jakto kuraĝige premis la ŝultron de sia nevo, sed la gesto nur memorigis al la knabo la celon de ilia vizito, kiun li provizore estis forgesinta kiam la pompo de la koridoro ravadis liajn mirplenajn okulojn. Kontraste, la ĉambro en kiu ili nun staris estis aŭstera kaj minaca, kaj li konstatis ke li volas iri al la necesejo.

La pordo kontraŭ ili malfermiĝis kaj sinjorino envenis. Ŝi staris flanke de

ĝi, atendente, kaj Ĉosto konstatis ke lia onklo profunde riverencas; do faris same. Estis murmuro de voĉoj, la sono de fermiĝanta pordo, kaj kiam li rektiĝis li vidis ke alia sinjorino staras antaŭ li, sinjorino pilastre alta, en fluanta blanka robo. Ŝiaj okuloj rigardis lin el vizaĝo kies severa belo informis Ĉoston ke tiu ĉi certe estas princino, fakte, la Kronprincedzino. Ŝi alparolis lin:

“Nu, nevo de mia Jaktó, kiel vi nomiĝas?” ŝi demandis.

“Ĉosto Filde Kirŝtan Elvo, via kronprincina moŝtino,” Ĉosto respondis, dum lia onklo subvoĉe ĝemis.

“Ĉosto` sufiĉos ĉi tie”, la sinjorino informis lin. “Kaj vi esperas eniri la palacan servon, ĉu?”

“Jes, moŝtino, post du jaroj”.

“Kaj kiel plaĉus al vi aliĝi jam nun al mia persona servo?”

“Tre multe, dankon, moŝtino”.

“Bone”. Aŝkasara esploris la suprenturnitan vizaĝon. Jes, ĝi povus aparteni al princeto – kial ne? – sed ne al ŝia princeto, kaj lia malgrando ne estis la malgrando de la pli juna knabo. Ĉu li tamen povus deviigi murdonton sufiĉe longe por savi ŝian Musĉjon, kaj eĉ ebligi kontraŭatakon? Nome, ĉu eblos iel utiligi tiun ĉi bubon?

“Nu do, ni vidu”, ŝi fine diris. “Mi sciigos vian onklon”.

La onklo kaj neveto riverencis kaj retiris sin. La Kronprincedzino iris al sia skribejo, kaj sidadis cerbumante. Se nur eblus foriri kun la edzo kaj gefiloj al iu fora angulo de la Imperio dum tiu ĉi damnita vizito! Sed tio estus nepardoneble ofenda al la gimdalaj vizitantoj, pesto afliktu ilin! Se nur iu kataklismo nuligus la viziton!

Estis neniu kataklismo, sed subita ŝanĝiĝo de la frusomera vetero lasis ĉiujn ĉambrojn kaj salonojn en la Palaco dentoklake malvarmaj.

“Kial oni ne rehejtas?” ŝi demandis senpacience. “Ĉu fornoj povas funkcii nur en vintro?”

“Ne”, ŝia edzo informis ŝin. “La fornoj jam funkcias. Se vi volas esti varma, iru al la servista ĉambraro, aŭ al la laborejoj – por ne mencii la kuirejojn kompreneble”.

“Kial mi iru ien ajn? Kial mi ne povas esti varma ĉi tie? Kial niaj ĉambroj ne unue varmiĝis?”

“Ĉar ili havas dikajn murojn por sufoki sonojn deeksterajn; do eĉ kiam la varma aero preterfluas, ĝi ne povas penetri dum iom da tempo. Ĉe la servistaj ĉambroj aliflanke la muroj estas malpli dikaj, kaj la varmo kiu fluas tra la interspaco povas pli frue trapasi ilin. Kompreneble ni havas enflulojn – ” li indikis kradon lokigitan alte en la muro “- kiu enlasas varmon sendepende de la interspaco. Tial estas jam iomete pli varma ol en la komenco, ĉu ne?”

“Sendepende de la interspaco?”

“Jes, laŭ tubegoj hermetike izolitaj de la interspaco por ke ili ne disfluigu sian varmon, kiu fakte pli rapide atingas la ĉambrojn ol la intermura fluo, eĉ se ĝi malpli efike hejtas post alveno”.

“Oni povus utiligi ilin por atingi nian Musĉjon”.

La Kronprinco ridis “Necesus utiligi ankaŭ serpenton”, li certigis. Tiu tubego estas tro mallarĝaj por homo”.

“Do per serpento. Kial ne?”

“Pro la kradoj, kaj pro la fakto ke serpento sufiĉe inteligenta por elekti ĝustan ĉambron kaj poste ĝustan personon estus ankaŭ tro inteligenta por entrepreni tian taskon nur ĉar iu ordonis”.

“Ta, kial vi ne povas taksi danĝeron pli serioze?”

Tiel la konversacio finiĝis, sed Aŝkasara daŭre pripensis ĝin. Ŝi precipe pripensis la vortojn de sia edzo rilate la larĝon de la hejtaj tubegoj.

“Ajrena”, ŝi demandis al sia ĉefa servistino, “kiu estas la ĉefa arkivisto?”

“Aldun Horum Kobeldo, kronprincezina moŝto,” Ajrena respondis.

“Kiu respondecas pri dokumentoj rilataj al la interna konstruo kaj hejtsistemo de la Palaco?” Aŝkasara demandis al Aldun Horum Kobeldo.

“Ernal Paliĉe Sordon”, kronprincezina moŝto”, respondis Kobeldo.

“Mi volas vidi la planojn por la hejttuba sistemo en tiu ĉi koridoro”, Aŝkasara sciigis al Ernal Paliĉe Sordon. Mi supozas ke vi povas liveri”.

“Certe, via kronprincezina moŝto”, Sordon respondis.

“Kiel larĝaj estas tiuj tuboj?” Aŝkasara demandis post kontrolo de la planoj. “Kaj ĉu perfekte rondaj?”

“Jen efektivaj formo kaj kalibro, moŝtino”, Sordon respondis, montrante al aparte granda folio. “Kiel via moŝteco povas vidi, la kalibroj estas ja regule rondaj”.

“Jes”, konsentis Aŝkasara, mezurante la diametron per ŝtofostrio, “kaj vi diras ke la skalo montras la efektivajn dimensiojn, unu por unu”.

“Ĝuste, moŝtino”.

“Bone. Kaj ĉu la tuboj ĉiam kurbiĝas laŭgrade, kiel la planoj montras?”

“Absolute, via moŝteco. Ni ĉiam evitas subitajn kurbojn, ĉar estus malfacile purigi, aŭ forigi eventualan obstrukcon, se la stangaro devus manovriĝi laŭ akutaj anguloj”.

Aŝkasara retenis la planojn kaj ordonis ke la Ĉambelano asistu ŝin dum inspektado de la ĉambroj kaj ĉambraroj asignitaj al la Gimdalanoj.

“Al niaj eminentaj vizitontoj, moŝtino?” la Ĉambelano demandis postkiam ŝi ripetis la ordonon al li persone. “Supozeble la ambasado?”

“Precize. La grupo kiu okupos parton de tiu ĉi koridoro”.

Dum la Ĉambelano kondukis ŝin tra la ĉambroj kaj ĉambraroj okupotaj de

la gimdala ambasado Aŝkasara notis certajn detalojn, precipe en la ĉambraroj okupotaj de Picito kaj liaj plej altrangaj amikoj. Tri el ili inkluzivis aŭdiencajn ĉambrojn, kaj precipe en tiuj interesis ŝin la muroj en kiuj lokiĝas la enfluilaj kradoj. La Ĉambelano konfirmis ke preter tiuj muroj kaj la intermura spaco estas ĉambroj en servista koridoro apartenantaj al vestistinoj kaj frizistinoj de iuj el ŝiaj propraj sinjorinoj akompanantaj.

“Viaj personaj servistinoj devos provizore translokiĝi”, ŝi informis tiujn. La Ĉambelano jam aranĝas iliajn substituotajn ĉambrojn”.

“Kiu estas la Administranto de Konstruoj?” ŝi demandis al Ajrena.

“Ilman Hadel Orm, kronprincezina moŝto”.

“Venigu lin”.

“Mi parolas al vi tute konfidence”, ŝi diris al Ilman Hadel Orm, kaj kiam la iom mistifikita Administranto agnoskis ke li plene komprenas la gravecon de tio, aldonis: “Mi volas ke vi rekomendu al mi spertulon pri konstruo al kies diskreto kaj lojalo mi povos absolute fidi. Nome, masoniston. Mi supozas ke vi konas iun tian”.

“Absolute, moŝtino. Mi konas ĉiujn masonistojn en la palaca servo, kaj mi estas certa ke ili ĉiuj estas centprocente lojalaj, sed por diskreto absoluta mi ne hezitas rekomendi Daleŝ Karabon, majstromasoniston. Lin kaj lian tutan helpantaron. Li elektas ĉiun individuon laŭ la grado de ties lojalo al la imperiestra familio”.

“Ĉu? Do ĝuste tian mi bezonas. Li renkontu min en la hiacinta koridoro – tuj.”

Kiam la senspira Daleŝ Karabo alvenis al la tiel nomata hiacinta koridoro, li trovis la Kronprincezinton paŝantan tien kaj reen, kun nur du gardistoj starantaj je diskreta distanco”

“Ha, nia majstromasonisto, ĉu?” ŝi supozis, ekvidinte lin.

Daleŝ profunde riverencis. “Je la servo de via kronprincedzina moŝto!” li certigis.

“Oni garantiis ke mi povas plene fidi vian diskreton”.

“Absolute, via moŝteco, kaj mi profunde dankas pro la granda honoro kiun – “

“Kompreneble. Nun la demando estas: ĉu vi povos plenumi tion kion mi projektas?”

“Mi volonte mortus, via – ”

“Tio neniel konvenus. Jen, sekvu min”. Ŝi malfermis pordon, kaj Daleŝ sekvis ŝin en senmeblan ĉambron. “Jen”, ŝi ripetis, montrante al la muro frontanta ilin. “Vi kredeble scias kio estas preter tiu muro”.

“Jes, moŝtino – la hejta interspaco”.

“Ĝuste. Kaj preter ĝi?”

“Muro de ĉambro en unu el la luksaj koridoroj – mi ne memoras ĝuste kiun”.

“Sed ĝi diferencas de ĉi tiu je - - - ?”

“Nu, dikeco, moŝtino. La ĉambroj en la luksaj koridoroj havas pli dikajn murojn por elbari nedeziratajn sonojn deekstere. Ĉu tion via moŝteco aludis?”

“Precize. Do, sciante tion, vi komprenos iujn problemojn kiujn mia projekto starigos. Jen kion mi volas: ke vi eltranĉu sekcion el tiu ĉi muro rekte kontraŭ la enfluila krado de la dika muro, kaj poste konstruu ĉirkaŭ la eltranĉaĵo kamereton en kiu persono povos stari. Ĉu tio fareblas?”

“Nu, kondiĉe ke mi scios kie fari mian eltranĉon por esti kontraŭ la enfluido en la alia muro, moŝtino.”.

“Ne ĝenu pri tio. Mi certigos ke la kontraŭa ĉambro estos malplena por permesi vin etendi borilon de ĝi en tiun ĉi muron”.

“Tio perfekte adekvatos, moŝtino. Eĉ plej eta truo en tiu ĉi muro montros kie ni eltranĉu”.

“Bone. Supozeble vi jam povas konjekti kion mi celas: starpunkton por permesi aŭskultadon ĉe tiu krado – por kiu, kompreneble, necesos ankaŭ truo en la hejttubo tie. La homoj kiuj okupos tiun ĉambron estas malamikoj de nia ŝtato – nun vi scias kial diskretego endas”.

“Mi ja, moŝtino, kaj mi povas ĵuri ke mi ne nur estos centprocente lojala, sed mi konstruos observatorieton kvazaŭ laŭmende faritan por vi persone – se estos via moŝteco kiu ja uzos ĝin --- ?”

“Jes, mi mem”.

“Mi povos etendi la plankon, en la kamereton kiun vi menciis, trans la intermura spaco por faciligi staradon tute apud la enfluido, kaj eĉ konstruos malaltan ŝtuparon ĉe la truo en la hejtotubo, se pli konvenos por via moŝteco”.

“Vere, Karobo Daleŝ, vi devancas varojn – ne, barojn - al bazaro – bonege komprenite! Nur – ĉu la homoj en la kontraŭa ĉambro aŭdos ion?”

“Pro la truo en la hejtotubo, moŝtino? Nu, eble sonoj de aliaj partoj de la Palaco penetros, atinginte ĝin tra la intermura spaco”.

“Hm”.

“Sed, plej alta, ni povos hermetike enfermi la tutan kamereton, etendante ĝiajn murojn, kiel ĝian plankon, ĝis la kontraŭa muro, kaj tiel ekskludi ĉiujn eksterajn sonojn. Kompreneble, la hejtotubo portos nur siajn proprajn sonojn, por kiuj la sorbiloj adekvatos”.

“Propraj sonoj? Ĉu voĉoj do?”

“Jes, voĉoj de plej najbaraj ĉambroj, sed kompreneble la sorbiloj ne malhelpos ke vi aŭdu per la truo, antaŭ ol ili atingos la enfluilon – se tion vi volas, moŝtino.”

“Jes, tion mi ja volas. Kaj ĉu vortoj estos kompreneblaj?”

“Ho jes, moŝtino; dum konstruado, la laboristoj uzis la tubegojn kiel komunikilojn. Kaj por ke sonoj de tiu ĉi ĉambro ne hazarde penetru, kiam vi ne ĉeestos, mi provizos por la truo moveblan sekcion per kiu fermi ĝin kiam vi foriros”.

“Karabo Daleŝ, vivadu! Kaj ne ĝenu vin pri la bruo de konstruado. Restas iom da tempo antaŭ ol oni okupos la ĉambrojn kontraŭajn, kaj la hiacinta koridoro estos permanente fermita al ĉiuj krom vi kaj mi – parenteze, vi devos ebligi facilan trapason al mia ĉambraro, kaj ankaŭ devos konstrui kameretojn en du aliaj ĉambroj. Mi supozas ke vi kaj via taĉmento povos fini ĉion ĉi antaŭ ol la alveno de niaj gastoj? Vi kompreneble scias al kiuj mi aludas.”

“Certe, moŝteco, kaj – ho jes.”

\* \* \*

**J**akto, mi decidis pri via nevo. Li venu rekte al mi. Se mi retenados lin ĝis la tempo por lia oficiala iniciigo en palacan servon, li povos tiam transiĝi. Sed kiam li finos siajn lernojarojn, li povos reveni al mia servo oficiale kondiĉe ke li jam plaĉis al mi”.

Jakto senprokraste komunikis la kronprincdzinan decidon al sia fratino, ŝia edzo kaj, kompreneble, sia neveto, kiu ne sciis ĉu ĝoji aŭ lamenti: la pompo de la Palaco kaj la alta sinjorino preskaŭ nostalgie iluminadis lian memoron ekde lia vizito, sed nun reiri, kaj ĉifoje ne reveni al siaj gepatroj estas ja timige.

Li krociĝis al sia onklo dum li trapasis la koridorojn kondukantajn al la kronprinca ĉambraro, kaj dum ili staris en la antaŭĉambro. La sama sinjorino envenis tra la kontraŭa pordo, sed ĉi tiun fojon, anstataŭ flankenstari por permesi la trapason de la Kronprincdzino, ŝi indikis ke Jakto nun reiru, dum Ĉosto sekvu ŝin tra la pordo. Obeinte, post kuraĝiga manpremo de lia onklo sur lia ŝultro, la knabo trovis sin en multe pli lukse ornamita ĉambro. Ĉe granda skribotablo apud la fenestro sidis sinjorino



kiun li rekonis kiel la Kronprincedzinon.

“Do Ĉosto, venu ĉi tien”, ŝi diris, kaj Ĉosto necerte alproksimiĝis al ŝi.

“Nu”, ŝi diris, streĉante ŝtofostrion sur liajn ŝultrojn, ĉu via onklo sciigis vin ke vi tre verŝajne restados en mia servo?”

“Jes, kronprincedzina moŝto”.

“Kaj kiel tio plaĉas?”

“Tre, kronprincedzina moŝto”, Ĉosto respondis, provante ignori la doloron en lia ventro.

“Kaj kio estas la unua regulo kiun lakeo devas memori?”

“Obei kaj silenti, moŝtino”.

“Kaj kion tio signifas?”

“Ke li agu laŭordone, kun fermita buŝo, moŝtino”.

“Tio estas?”

“Sen kontraŭdiroj, senproteste, moŝtino”.

“Ne nur tio, Ĉosto, sed ankaŭ ne parolante al aliaj personoj pri la diroj – inkluzive ordonojn – de siaj gemastroj. Ĉu vi memoras nun?”

“Jes, moŝtino”.

“Do iru nun kun Ajrena, kiu montros al vi kie vi dormos kaj manĝos kaj tiel plu. Poste, ŝia nevino, Amelda, prezentos vin al la princeto, al kiu vi povos iam iel utili, sed tio dume estas flankajo; mi baldaŭ venigos vin por klarigi definitivan taskon – taskon, kompreneble, pri kiu vi ne - - - vi ne - - - do kio?”

“Ankoraŭ ne scias, moŝtino”.

“Ne, ne – nu, jes, kompreneble, sed, krom tio, ion alian kiun vi ne – nome, vi ne - - - ?”

“Parolos al aliaj personoj, moŝtino”, Ĉosto sugestis, timigite.

“Bone. Memoru do”. Aŝkasara jam sonorilis, kaj nun Ajrena aperis, kaj kun kuraĝiga rideto al Ĉosto, signis ke li akompanu ŝin.

\* \* \*

**Ĉ**osto vekigis frue post dormo perturbita de sonĝoj – sonĝoj malagrablaj. Li ĉirkaŭrigardis, kaj rekoninte la etan ĉambron, aneksaĵon de tiu en kiu Amelda dormas, li memoris la eventojn de la antaŭa tago.

La ĉefa estis lia veno al la Palaco; de tio sekvis lia renkontiĝo kun la Kronprincdzino, kiu prezentis lin al Ajrena, kiu siavice prezentis lin al aro de servistinoj kies taskon li devis dividi. Tion li ne ŝatis: dum li provis aranĝi diversajn tolaĵojn laŭ iliaj instrukcioj, ili diskutadis lin kun ne tre kaŝitaj kaŝridoj, kaj faradis komentojn pri li kiujn li ne komprenis. Poste Amelda, nevino de Ajrena, alvokis lin por prezento al la princeto Zefreno, kiu faris al li serion de demandoj pri liaj origino kaj kapabloj antaŭ ol promesi dehaki lian kapon. Amelda milde riproĉis, kaj poste certigis al Ĉosto kun afabla rideto ke la minaco signifas nenion, sed li fine enlitiĝis kore bedaŭrante ke li ne destiniĝis fariĝi ceramikisto kiel lia patro.

Vekiĝinte, li ne povis redormi, sed tio ne gravis, ĉar postnelonge Amelda venis por helpi lin vestiĝi en kvazaŭ miniatura livreo, ĉar ĝi estis speciale fabrikita por iu eĉ pli malgranda ol la plej malgranda lakelernanto, sed ĝi tamen indikis ke li estas en la servo de la Kronprincdzino. Li matenmanĝis ĉe malgranda tablo en la ĉambro de Amelda, kiu sciigis lin ke li ne devos labori hodiaŭ car la Kronprincdzino volas ke li restu libera ĝis ŝi venigos lin. Ĉosto jam sentis sin pli optimisma, kaj kiam Amelda foriris, li fiere paradis ĉirkaŭ la ĉambro, bedaŭrante ke liaj amiketoj ne povas vidi lin en lia livreo. Kiam Amelda revenis kun korbo da tasketoj, ŝi invitis lin helpi laŭ lia povo. Tiel la mateno sufiĉe agrable pasadis, ĉar Amelda estis tute alia persono ol la junulinoj kun kiuj li devis kunlabori la tagon antaŭan, kaj estis preskaŭ tagmezo kiam lakeo anoncis ke ŝia

kronprincezina moŝto atendas lin. Estis momento de plezuro kiam li vidis konatan vizaĝon en la antaŭĉambro, ĉar Jakto ĵus ricevis finajn instrukciojn pri sia rolo dum la vizito de la gimdala ambasado: li akompanos kiel sekretario unu al la diplomatoj kiuj eskortos la gastojn de la landlimo ĝis la ĉefurbo. Dumvoje li kiom eble plej intimos kun unu, aŭ pluraj, el la oficistoj akompanantaj Piciton, aŭ iujn aliajn membrojn de ties kamarilo, kaj kribros iliajn konversaciojn por eventuale utilaj eroj. Krom tio, li uzos la orelojn kiel cirkonstancoj permesos.

Ne estis tempo por pli ol unu-du kuraĝigaj vortoj de onklo al nevo, ĉar la ena pordo jam staris malfermita, kaj preter ĝi la Kronprincezino atendis. Ŝi indikis ke la sola sinjorino akompananta lasu ilin, kaj atendis ĝis la pordo fermiĝis antaŭ ol alparoli Ĉoston. Ĉi tiu dume rimarkis en kristala vazo sur la tablo apud la fenestro monteton de rozkoloraj sferoj, kiujn li tuj rekonis, kvankam li neniam antaŭe vidis ilin: tiuj delikataj globetoj sendube estas la tiel nomataj perloj de lunlumo, renoma dolĉaĵo el la lando Neko Festeni, kiu dissendis ĝin tra la tuta civilizita mondo, sed sole al tre ekskluzivaj adresoj.

“Nu, Ĉosto,” la Kronprincezino demandis, “ĉu vi rimarkas ion interesan en la ĉambro hodiaŭ? – ne; ne tie”, ŝi senpacience admonis. “Sur la muro, malantaŭ mi”.

Ĉosto kun malfacilo fortiris sian rigardon de la perloj de lunlumo, kaj rigardis la menciitan muron.

“Estas tri rubandoj ligitaj al la krado”, kronprincezina moŝto”, li diris. “Unu verda, unu ruĝa kaj unu flava.”.

“Tion oni kredu, kvankam nur iliaj finaĵoj montriĝas; la ceteroj kuŝas preter la krado, en speco de tunelo, volvitaj je la momento, sed krom ne menciitaj tion al iu ajn, vi devos iam – Ĉosto, ĉu vi atentas?”

“Jes, moŝtino”, respondis Ĉosto, denove fortirante sian rigardon de la hipnotaj globetoj.

“Kion mi ĵus diris?”

“Ni vidas nur la finaĵojn de la rubandoj, moŝtino; la rubandoj mem estas en speco de tunelo preter la krado, volvitaj”.

“Nu, pli-malpli, sed se iu demandas, vi ne mencios tion; vi diros ke mi suspektis troan trablovadon, kaj ordonis ke oni fiksu ilin por montri ĉu tiel fakte estas. Ĉu komprenite? Bone. Kaj nun, Ĉosto, aŭskultu: via tasko – tasko kontraŭ la malamikoj de via lando kaj ĝia Imperiestro – estos krabli, aŭ serpentumi laŭ la tunelo, tenante la rubandojn, ĝis vi atingos iliajn limojn. Ĉu vi komprenas tion?”

“Jes, moŝtino”, respondis Ĉosto senentuziasme.

“Bone. Do la longoj estas malsimilaj inter si, kaj la finaĵo de ĉiu rubando espereble atingos ĝuste la pozicion de ĉambro asignita al unu el tiuj alilanduloj kiuj ekde morgaŭ loĝos en la Palaco. Vi scias kompreneble kiujn mi aludas, ĉu ne?”

“Ambasado kaj komisiono de Gimdalo alvenos morgaŭ, moŝtino”. Ĉosto sciis ke la du distingiĝis, sed ne kiel.

“Jes, sed interesas nin sole la ambasado. Ĉosto, kion vi opinias: ĉu ke estas prudente fidi al tiuj homoj simple ĉar ili venas inter ni kun amikemaj vortoj kaj ridintantaj vizaĝoj?”

“Fidu gimdalan rideton kiam la karno jam ne kaŝas ĝin”, citis Ĉosto, kies indiferenton pri la demando kontraŭpezis ĝia ŝajna konekso kun Gimdalo. Lia onklo instruis al li kelkajn frazojn kiuj povos plaĉi al La Kronprincezino, se okazo prezentos sin por cito, kaj Ĉosto divenis ke tia okazo prezentas sin nun. “Tiam ĝi montras veron”, li daŭrigis, “ke ĝia posedanto estas en tiu stato kiun li plej meritas”. Kuraĝigite de la esprimo sur la vizaĝo de sia mastrino, li entuziasme aldonis: “Gimdalano plej puras kiam li plej plene forputris”.

“Nu jen, kia lerta knabo!” ekdiris la Kronprincezino, ĉarmite. “Do ni certe ne fidu ilin, Ĉosto, sed male ni subaŭskultu iliajn perfidajn planojn, ĉu ne? Sed por ebligi nin fari tion, estas necese ke vi tiru tiujn rubandojn tra la tunelo por lokigi la ĉambrojn de la plej venenaj el ili. Ĉu vi povos fari tion?”

“Ho jes, moŝtino,” kriis Ĉosto, forportite pro la kronprincezina aprobo.

“Bone. Venu kun mi,” diris lia inspirintino, kaj kun fina rigardo al la perloj de lunlumo, Ĉosto sekvis ŝin en sian tualetejon, kaj tra ĝi al unu el ĝiaj vestejoj, kies pordon Aŝkasara devis malŝlosi antaŭ ol ili povis eniri.

Ĝi estis preskaŭ malplena. Ĉiuj vestoj jam elportiĝis, sed ŝtupareto staris kontraŭ la muro kun la enfluido, el kiu Karobo estis ellevinta la kradon. “Jen, Ĉosto”, la kronprincezino montris, “la vojo estas malferma. Ne timu la mallarĝon; mi mezuris, kaj mi povas certigi ke vi bone konvenos. Iru tiudirekten –“ Ŝi indikis permane “– ĝis la ĉambro kun la rubandoj; ektenu ilin kaj pluiru ĝis la tuta longo de unu rubando; lasu tiun, kaj daŭrigu ĝis vi devos lasi la duan, kaj fine la trian. Poste pluiru – ĉar vi ne povos turni vin – ĝis vi venos al senkrada enfluido. Estos ŝtupareto sub ĝi, per kiu vi povos eliri en ĉambron similan al ĉi tiu. Kiam vi lasos tiun ĉambron, turnu vin maldekstren - kiu estas via maldekstra mano? Bone – kaj venu laŭ la koridoro al tiu ĉi ĉambro.” Ŝi malfermis la pordon konstruitan de Karobo por ebligi senperan eliron en la hiacintan koridoron, por montri la simbolon sur ĝi. “Ĉu vi rekonos tion? Bone. Do ek al !”

Ĉosto movis la ŝtupareton pli apuden al la enfluido, kaj ekgrimpis. Kiam li atingis la aperturon, li kapunue eniris la tubegon, kaj per spasmaj korpotordiĝoj turnis sin en la direkton indikitan de la Kronprincezino. Dum kelkaj sekundoj li surventre kuŝis tie, anhelante, kun kreskanta paniko, ĉar estis mallume, kaj la tunelo estis tiel mallarĝa ke li ne povis retiri la brakojn laŭlonge de la korpo. La voĉo de lia mastrino urĝanta ekagadon rekonstatigis lin pri la neevitebla devo; do, per tirantaj kubutoj kaj spasmaj movoj de la korpo, li rampis antaŭen.

Dum etero, ŝajnis al li, li strebe sed malrapide progresis ĉiam pli profunden en mallumon, kun la malcedema interno de la tubego kvazaŭ minacanta premi lin ĝis sufoko, sed fine li vidis lumon antaŭ si. Ĝi projekciis la kvadraton tra kiu ĝi pasis sur la pale glatan kurbon de la tubeginerno, kaj klare montris amasetojn de verdo, ruĝo kaj flavo –la volvitajn rubandojn kiujn la Kronprincezino priskribis.

Atinginte ilin, Ĉosto volvis la finaĵojn de du el ili ĉirkaŭ unu mano kaj la trian ĉirkaŭ la alia, antaŭ ol ŝovi la restantajn volvaĵojn al ambaŭ flankoj por ke ili ne impliku lian pasadon, kaj kun punitaj manoj tenataj antaŭ si, pluenrampis laŭ la tubego. Kiam, post eĉ pli longa tempo, li denove vidis lumon, li rimarkis ke ĝi venas de ambaŭ flankoj, ĉar Aŝkasara ellasis la remeteblan sekcion en la kamereto, kaj lasis la kameretan pordon malferma. Ĉosto ne sciis tion, sed li sciis ke li alvenis al signifa punkto, ĉar la rezisto de la verda rubando indikis ke li atingis ĝian finon. Li lasis ĝin kaj rampadis pluen, ĝis li denove atingis lumon, kaj la finon de la ruĝa rubando. Doloraj kubutoj kaj lacegaj muskoloj protestis kontraŭ plua sintrenado, sed li sciis ke li devas fini tion kion li tiel sukcese komencis, kaj la flava rubando fine elĉerpiĝis, permesante lin daŭrigi la rampadon, nun kun malplenaj manoj kaj leviĝinta koro, ĝis finfine li atingis kun dankemo la senkradan aperturon, kun ŝtupareto sub ĝi, ĝuste kiel lia mastrino promesis.

Iom preterpasinte la aperturon, li poste retrovenis, kaj turniĝinte por permesi eliron, li serĉis perpiede la ŝtupojn dum malsupreniro, ĝis li fine staris anhelante sur la sekureco de la planko, permesante al la koro trankviliĝi antaŭ ol iri al la pordo de la ĉambreto.

Li malfermis ĝin, kaj post rapida ekrigardo al ambaŭ direktoj, impete ekkuris laŭ la koridoro, malŝarĝante sian timon kaj avide antaŭĝuante mastrinan laŭdon. Li ne devis identigi la ĝustan pordon, ĉar Aŝkasara malfermis ĝin je lia alproksimiĝo, kaj gestis ke li trairu la tualetejon al la granda ĉambro pretera.

Ŝi fermis la pordon antaŭ ol turni sin al li. “Do Ĉosto”, ŝi demandis, “ĉu mi aklamu sukceson?”

“Jes, kronprincdzina moŝto; la tri rubandoj finiĝis ĝuste ĉe tri enfluiroj, kaj mi sen ajna malfacilo trovis la elirejon kaj ŝtupareton”.

“Perfekte. Do aŭskultu kion vi devos venontfoje, Ĉosto. Vi eniros la tunelon ĉe la kontraŭa fino, por atingi lokon meze de la tri enfluiroj, kaj de tie vi povos aŭdi en kiu el la tri salonoj niaj malamikoj kunvenas. Vi

signalos tion per tiro de la konvena rubando, ĉar ekde nun iliaj nodoj ĉi tie estos nur glitnodoj, kaj tial la finaĵo de la tirita rubando malaperos malantaŭ la krado, kaj mi scios kie ili kunvenas. Ne ploru, Ĉosto; vi deĵoros nur kiam kunveno eblos por ili, kaj fakte kiam mi aŭskultos ilian unuan kunvenon – verŝajne morgaŭ vespere – estas tre kredeble ke mi aŭdos iliajn aranĝojn por la venonta kunveno, kaj tiam por la posta, kaj tiel plu. Sekve, se tiel estos, vi devos deĵori nur unufoje; do forviŝu viajn larmojn kaj estu danka pro tasko bone farita, kaj eble nun finita, ĉu ne? Bone. Kaj nun jen Amelda. Amelda, prizorgu lin; li ripozu, kaj poste distru sin laŭvole, ĝis mi revenigos lin. Li ne okupiĝu pri aliaj taskoj. Certigu tion”.

Amelda riverencis kaj, kun kuraĝiga rideto, etendis manon al Ĉosto, kiu post fina rigardo al la tablo apud la fenestro, ekprenis ĝin kaj akompanis ŝin el la ĉambro.

\* \* \*

**A**ŝkasara estis en la imperiestra grupo kiu akceptis la gimdalan ambasadon. Ŝi aŭskultis kun fiksitaj trajtoj al panegiretoj pri ŝi antaŭ ol respondi al tiuj per frosteca ĝentilo.

Ŝi devis ĉeesti ankaŭ la bankedon aranĝitan honore al ĝi, sed neniu el ĝiaj membroj estis sufiĉe altrangaj por sidi kun la imperiestra familio; do ŝi povis ignori ilin dummanĝe, kaj dum la spektakloj kiuj sekvis. Poste, si atente observadis ilin drivantajn socieme de grupo al grupo, proktektinte sin mem de ilia altrudo per cirklo de diskrete postenigitaj funkciuloj.

Ŝi distre konversaciis kaj daŭre observadis, ĝis la gastoj unuope kaj en grupoj komencis lasi la salonon, kaj kiam la unuaj gimdalanoj fordrivis, ŝi faris abruptajn senkulpigojn kaj rapidis al sia ĉambraro. Tie la rubandoj ankoraŭ pendis de la krado, sed ŝi ne devis longe atendi antaŭ ol la ruĝa rubando ektikis kaj, post unu – du saltetoj, glitis supren por malaperi malantaŭ la krado.

Moviĝante kun regata rapido, Aŝkasara trapasis la tualetejon kaj vestejon, kaj elirinte en la hiacintan koridoron laŭiris ĝin ĝis ŝi atingis la ĉambron kiu situis kontraŭ la meza el la tri gimdalaj ĉambraroj kontrolitaj de Ĉosto. Ŝi eniris la kabineton ĝuste kiam voĉo deklaris: “ - - - pri tio estu certa. Dume, sufiĉas konstati ke ni havas unu, kaj baldaŭ havos du, el ŝiaj homoj, kaj permesu al mi diri, amikoj, ke eĉ la plensukceso de nia tuta entrepreno ne donos pli da plezuro al mi ol nia subfoso de tiu hibridaĉa princinhetajro, kiu eĉ ne havas la decon prihonti la dalfuntan sangon kiu infektas ŝiajn vejnojn”.

Estis murmuro de amuzo kaj konsento, kaj Aŝkasara konvulsie pugnigis la manojn kaj mordis la lipon por subpremi la furiozon bolantan en ŝi. Tra zumado de pulsanta sango ŝi aŭdis la parolinton adiaŭi la aliajn, kun admona “Ĝis sama horo ĉi tie morgaŭ vespere do!” Tio signifis ke ĝi estas la ĉambro de la ĵusa parolinto; nome, Amon Hormel, Grafo de Peroldo, kaj aparta amiko de la abomena Picito, kiu mem ŝajne ne ĉeestis.

Flamante de indigno, ŝi marŝis reen al sia ĉambraro, kaj senpacience atendis sian edzon, kiu devis restadi gastamante en la bankeda halo pro la malesto de la Imperiestro. Kiam li fine alvenis, ŝia indigno superbolis. Paŝante tien kaj reen, ŝi anatemis la tutan gimdalan nacion, selektante por elimino la picitan grupon, kies doloran adiaŭon al tiu ĉi mondo ŝi detaligis kun volupta ĝuo. Tamen, ĝuste kiam ŝi atingis la pinton de inventemo, aludonte la Grafon de Peroldo, rememoro pri liaj vortoj rilatantaj al ŝi mem ŝtopis la vortojn en gorĝo jam ne sufiĉe larĝa por trapasigi la torenton, kaj la Kronprinco povis enmeti demandon:

“Vi aludis – ie – subaĉeton de unu el niaj. Ĉu jen ĉio? Ĉu neniu mencio pri kies – mia aŭ via?”

“Mia! Mia! Kaj baldaŭ estos du, laŭ la kanajlo. Vi pravas”, ŝi daŭrigis, jam pli milde, “ni devas pensi pri tio anstataŭ malŝpari energion per senutila insultado. Kiu? Kiu?”

“Ni pripensu eblojn laŭorde”, sugestis la Kronprinco, “komencante je kiu plej intime kontaktiĝas kun la knabo. Tio estas Amelda, ĉu ne?”

“Ne, ne – jes, jes, estas Amelda, sed tute ne. Ŝi estas centprocente



lojala. Pri ŝi mi estas certa”.

“Pri ĉiuj vi estis certa kiam ni lastfoje konsideris la problemon. Necesas plenkonstati ke la perfidonto estas persono kiu estas je la momento plene fidata”.

“Mi scias, mi scias, sed ne Amelda. Mi tro bone konas ŝin. Ŝi ne povus kaŝi perfidemon de mi”.

Ili trakonsideris la tutan sekvantaron de Aŝkasara unuope, sed ne sukcesis izoli iun suspektindan. Certe, estis kelkaj ĉe la perimetro kiujn ili ne tiel bone konas, sed ĝuste ties lojalo estas malpli aĉetinda, ĉar ili ne multe kontaktiĝas kun la Princeto. Fine, ili interkonsentis ke la sola rimedo estas atendi ĝis Aŝkasara aŭdos ion pli konkretan kiam ŝi subaŭskultos venontajn kunvenojn de la konspirantoj, kaj ĝis tiam restadi kiel eble plej singardaj pri ĉiuj.

\* \* \*

**J**akto ne povis tiel anonime spioni kiel dum liaj tagoj ĉe Kulkaŭ, ĉar tiam oni nur nebule komprenis lian veran okupon en la Palaco, sed nun la tuta kortego sciis ke li estas agente iaspeca de la kronprinca familio, kaj kion, la kortego sciis, tion la vizitantoj baldaŭ sciis.

Tamen la picita kamarilo ne devis dependi de kortega klaĉado por utila informo, ĉar ili havis juglandan amikon, kiu ne nur informis sed ankaŭ pretis kunlabori laŭnecese, kaj kun li ili kunsidis baldaŭ post alveno al la Palaco.

Rezulte de tiu kunsido, la Grafo de Ŝaratreo povis informi sian edzinon ke ŝi devas esti en la laŭbo apud la Leona Pordego iom antaŭ sunsubiro, akompanate de du aliaj sinjorinoj.

“Sed kiel mi povos esti certa ke ili volos akompani min, Kleĉjo?” ŝi demandis dubeme.

“Ĉar estos tro malĝentile rifuzi”, ŝia edzo respondis kun sarkasme

emfazigita pacienco: “ili ne alie okupiĝos ĝuste tiam, kiel vi bone scios, kaj ili scios ke vi bone scias”.

“Sed eĉ se mi vidos ion, mi ne estos taŭga atestantino”, lia edzino kvazaŭ petis; “La Kronprincino ne ŝatas min”.

“Eble ĉar vi ankoraŭ ne konas ŝian titolon”, la Grafo diris malpacience. “Ĉesu tiun ĉi ĉikanadon. Estos tri aliaj atestantinoj, du juglandaj kaj unu gimdala – kiu, parenteze, havos multe pli malfacilan rolon ol vi. Vi nur devos promeneti tra la palaca ĝardeno kun Luenca kaj Jilda – aŭ kiuj ajn - kaj, kiam vi venos al la laŭbo, diru ke vi lacas kaj devos ripozi tie. La kiosko estas klare videbla de ĝi; do nur necesos atendi.”.

“Sed eble li ne – ”

“Sufiĉe, Hilfajna! Vi ĉiam sopiris riĉaĵojn kaj prestiĝon. Do nun ili povos realiĝi, per fareto: nur irigu du sinjorinojn al tiu laŭbo, kaj lasu la ceteron al ni”.

La cetero ne estis multo: du el la superaj lakeoj de la Grafo de Ŝaratreo “hazarde” renkontis Jakton en la koridoro laŭ kiu li lasis la Palacon ĉiun vesperon. Post interŝanĝo de formalaj komplimentoj kaj ĝeneralaĵoj, ili invitis lin kuntrinki pokalon da vino por celebri la finon de lia deĵoro (kiel “sekretario”) kun la diplomato, forbalaante lian rezistemon kun bonhumora persisto, ĝis li fine cedis, tiel ke estis jam ekkrepuskiĝante kiam li fine eliris el la Palaco kaj direktis siajn paŝojn al la Leona Pordego, laŭ kiu li lasos la ĝardenon survoje al la loĝejo de la diplomato por la lasta fojo.

\* \* \*

**D**ume, oni vestadis la Kronprincedzinon prepare al la bankedo en la gimdala ambasadejo. Ne estis facila tasko, pro ŝiaj senpaciencaj

Ŝultrotikoj, kapekturnoj kaj eĉ ekpaŝoj tra la ĉambro. Ŝi ankoraŭ interne boladis pro indigno, kaj tiuj fizikaj reagoj proklamis tion al ŝiaj kompatindaj vestistinoj, sed kion ŝi permesis al siaj servistinoj vidi, tio estis tute ne perceptebla kiam ŝi sidis en la bankeda honorloko, aŭskultante kun ŝtona indiferento la panegiron de la ambasadoro pri ŝiaj graco, korvarmo, komplezemo kaj gastamo.

Kiam postmanĝe oni lasis la tablojn, ŝi ne povis, kiel ĉe la palaca bankedo, protekti sin per cirklo de diplomataj pikedoj, sed ŝia glacia rezervemo estis efika ŝildo kontraŭ la trudoj de optimismaj gimdalanoj kiuj opiniis siajn ĉarmojn sufiĉaj rekomendoj por tiu ĉi juglanda fierulino. Ŝi ne longe restis, sciigante al la ambasadoro, sen troa peno konvinki, ke ŝi suferas kapdoloron. Ŝia foriro estis frua, sed ne urĝa; ŝi eĉ disponis tempon iom ripozi, kaj distri sin per konversacio kun siaj sinjorinoj antaŭ ol forsendi ilin, prelode al eliro en la hiacintan koridoron.

Atinginte sian spionejon, ŝi tuj aŭdis voĉojn en la ĉambro de Hormel, kaj konjektis ke tiuj apartenas al iuj frualvenintoj. Ŝi povis identigi la voĉon de Hormel mem en la vortoj “- - - eĉ antaŭ ol ni reiros”.

“Ĉu li havas tian kapablon do?” demandis alia voĉo.

“Ho jes, fidu min. Li sendube havas specialan rilaton kun ili, precipe kun ŝi. Laŭ Ŝaratreo, kies edzino akompanadas ŝin, ŝi tutrutine nazalnazas kun li malantaŭ fermitaj pordoj”.

“Ĉu? Interese! Ĉu vi opinias ke ili - ?”

“Kio?! La Turo de Sinamo kun nura lakeo? Princino Puro cedanta al la karno? Ho ne, ne! Ĉu vi ŝercas?”

“Do mi divenas ke la respondo estas ne”, la demandinto diris. “Kial tio ne surprizas min?” li daŭrigis, kontribuante al la ĝenerala rido, dum la sango de Aŝkasara bolante eksturmis tra ŝiaj vejnoj, sed frostiga konstato bridis ĝian impetemon: la Grafo de Ŝaratreo estas unu el la perfiduloj, sed estis la alia kiu – ĉu vere povas esti?

Pordo malfermiĝas, kaj anstataŭis la ridon nova murmuro de voĉoj, interrompita de interjekcioj kaj salutoj, ĝis Hormel, parolante juglandlingve, silentigis la ĝeneralan zumadon per “Ha, kaj jen nia valora

rekruto, ĉu?”

“Jes”, konfirmis nova voĉo. “Amikoj, permesu prezenti novan juvelon en nia brilaĵaro, la homon kiu glatigos nian padon per unusola – “

“Mi ne konsentis glatigi ion ajn”, iu interrompis, kaj la koro de Aŝkasara eksaltis malagrade: estis la voĉo de Jakto.

“Nu, ankoraŭ ne, ankoraŭ ne”, la alia voĉo koncedis, “sed antaŭ ol vi lasos ĉi tiun ĉambron vi jam estos konsentita”.

“Ne vetu je tio”, Jakto konsilis.

“Sed mi ja vetos je tio, `de Korsan, se mi tiel volas, kaj mi ankaŭ donos al vi konsilon: ne alparolu min per tiu tono, simple ĉar mi afable traktas vin. Vi glatigos se ni diros `Glatigu`”, li daŭrigis, dum la sono de pordo malfermiĝanta denove aŭdeblis fone, “ĉar vi ne havas alternativon. Spitu nin, kaj je la dioj, ni ĵetos vin al la lupoj – kaj lupino, ĉar via kara mastrino postulos punon pli drastan ol iu alia kiam ŝi ekscios pri via eta cedo al tentiĝo – speco de tentiĝo kiu aparte naŭzos ŝin”.

“Ne, ne, Amon; ni estu pozitivaj”. Estis la voĉo de Picito mem, ŝajne la ĵusalveninto.

“Saluton, amikoj; saluton, Jakto – estas Jakto, ĉu ne?” li daŭrigis, modulante sian tonon en silkecan persvademon, “ankaŭ amiko, mi esperas, ĉar finfine ni havas komunan intereson: kaŝi vian bedaŭrindan delikton de la oreloj de via mastrino, ĉar nur pripensu, Jakto: ian kontentiĝon pro lojaleco kiun vi sentos pli ol kontraŭpezos la hontego kiu konsumos vin je la konstato ke ŝi scias pri tio kion vi faris – por ne menciigi universalan anatemon kaj la punegon kiun ŝi elpensos kiel adekvatan. Kunlaboru kun ni, aliflanke, kaj ŝi daŭre estimados vin kiel lojalan servanton, ĉar neniu el ni memoros ke la incidento iam okazis – mi absolute garantias tion, Jakto. Kaj kio estos tiu kunlaboro? – nur unu bagatela ago komencos kaj finos ĝin. Poste, vi povos daŭre servi la kronprincan paron kun absoluta fideleco. Kaj pli ol tio, se nia entrepreno prosperos, vi fine havos honoron pozitivan ĉe la gimdalaj kortego kaj administraro, kaj ĉe la juglanda kortego de lia imperiestra moŝto, Ermuskero la Unua”.

“Kaj se ĝi ne?”

“Eĉ se ĝi ne, vi povos certi pri brila kariero, ĉe la gimdala kortego, se vi volas, aŭ ĉi tie se vi preferas, ĉar ni havas sufiĉan influon eĉ ĉi tie en certaj rondoj por certigi promocion. Vi estas inteligenta kaj entreprenema, Jakto; ni scias ke vi jam havas aparte respondecan rolon ĉe viaj gemastroj, kaj via lastatempa funkciado kiel sekretario pruvas ke vi kapablas esti oficisto. Kun nia helpo vi facile fariĝus tia, kaj oficistoj, kiel vi scias, povas atingi prestiĝajn postenojn – eĉ, eventuale, nobeliĝi. Pensu pri tio. Esti lakeo en la imperia servo estas kariero honorinda sed limiga, ne sole por la individuo, sed ankaŭ por ties idoj. Tio ankaŭ estas pripensinda. Kaj jen nun oportuno unika – kun kia alternativo? Do akceptu la okazon. Oni jam indikis kio necesas, ĉu ne?”

“Ĝenerale, jes”.

“Do plendetale, jen: prenu ĉi tion. Vi simple devos anstataŭi unu el liaj propraj per ĝi. Ĉu ne arome? Liaj gepatroj mem faciligis lian eliminon, insistante ke li havu proprajn, kvazaŭ li estus plenkreskulo. Kaj anstataŭ konsciencajn riproĉojn pri senkulpa kerubo, vi meritos gratulon kaj mondaklamon ĉar vi helpis forigi troindulgitan monstran bubaĉon, ĉu ne? Kompreneble. Poste, nur necesos konduti normale; neniu suspektos vin. Li preskaŭ tuj eksuferos de iomaj koliko kaj naŭzo, sed tiuj rapide forpasos kaj li ŝajnos resaniĝi, tiom ke la simptomoj de febro kiuj sekvas havos neniun evidentan konekson kun la antaŭa malsaneto, kvankam ili fakte indikos la komenciĝon de la fatala marasmo, kiun la koliko kaj naŭzo origine heroldis. Do eĉ se iu suspektos, neniu suspektos vin. Ĉu klare?”

“Jes”.

“Bone. Do restas nun simple subskribi tiun ĉi konfeson”.

“Konfeson?”

“Pri la alia afero, kaj via provo averti ĝiajn sekvojn, proponante al ni ke vi faros tiun ĉi kroman abomenaĵon kondiĉe ke ni silentigos la atestantinojn pri la unua. Ĝi estas nia garantio kontraŭ iu provo viaparte perfidi nian projekton. Tial tiuj sinjoroj ĉeestas – por subskribi vian subskribon, kaj fari certon duoble certa, sed ne ĝenu vin, Jakto; ni uzos nur se vi devigos.

Alie, simple ne profitus nin uzi ĝin. Vi povas vidi tion, ĉu ne? Do bone. Nun, tie kaj tie!”

Estis silento dum kelkaj momentoj. Poste Picito daŭrigis: “Kiel mi diris, Jakto, ne ĝenu vin; ni sabotus propran entreprenon se ni nedevigite publikigus tian dokumenton. Fakte, mi volonte detruos ĝin tuj kiam la bubaĉo montros unuajn simptomojn; sed tio devos esti tre baldaŭ. La sinjorinoj ne povus plu prokrastigi sian akuzon, malgraŭ senkulpigoj pri ŝoko, reago, konsilado kaj tiel plu. Jen do: ĝuste tie!”

Denove estis mallonga silento. Poste, la voĉo de Picito diris: “Perfekte. Do vi povas iri nun, Jakto, kaj mi atendos kiel eble plej pacience bultenon pri koliko kaj naŭzo kaj ties konekso kun tre juna membro de la imperia familio”.

Aŝkasara ne plu atendis. Ŝi rapidis reen al sia ĉambraro, agitate de konfuzaj pensoj kaj reagoj. Atinginte sian buduaron, ŝi paŝadis tien kaj reen provante klarigi al si ĝuste kia estas la situacio. Unue, ŝia Musĉjo; poste, supozeble ŝia edzo, kaj ĉu ili atendos naturan morton de la Imperiestro mem? Se ŝia edzo nur venus! Kial li devas prokrastigi sian forlason de la bankedo nur por komplezi al tiuj gimdalaj hundoj?

Kaj Jakto perfidulo! Kion li faris tiel hontindan ke li pretas kaŝi ĝin per nuda perfido? Se ĝi estas tiel nepardoneble fia ke li ne povis toleri ke ŝi sciu pri ĝi, kial li ne mortigis sin prefere ol kraĉi sur ŝian fidon? Ĉar ŝi ja fidis, plene fidis. Fidis iuspecan fiulon kiu eĉ ne meritis dungon. Ĉu arestigi lin tuj, aŭ ĉu atendi por espereble eltrovi ilian taktikon antaŭ ol averti ilin? Kial ŝia edzo ne venas? Ŝi devas enverŝi pensojn kaj reagojn en simpatian orelon, por ne paroli pri konsulti.

Estis frapeto ĉe la pordo. Eĉ la Kronprinco frapetis antaŭ ol enveni kiam ŝi estas en la buduaro, sed ĉifoje neniu envenis. Anstataŭe, estis alia frapeto.

“Venu”, ŝi diris senpacience.

Sinjorino de la antaŭĉambro envenis. “Jakto estas ekstere, moŝtino”, ŝi klarigis. “Li petas permeson alparoli – ”

“Jakto? Ĉi tie?”

“Jes, moŝtino; li pardonpetas ĉar li ne atendas ĝis mateno, sed li volas komuniki ion tre urĝan – ”

“Ĉu li indikis pri kio temas, Ŝilelda?”

“Ne, moŝtino, li rifuzis klarigi, sed insistis ke urĝegas”.

“Tiuokaze, li venu”.

“En la salonon, moŝtino?”

“Ne, ĉi tien”. Aŝkasara ekstaris por fronti la pordon, kaj Ŝilelda lasis la ĉambron. Kiam la pordo remalfermiĝis, ŝi flanke staris por permesi al Jakto enpasi. Li riverencis, kaj staris atendante, rigardante Aŝkasaran per singardemaj okuloj. Aŝkasara rerigardis dum iom da tempo, rimarkante la kunpremitajn lipojn, la vangojn nerveze ensuĉitajn, kun gratpostsignoj sur unu el ili, kaj fine demandis: “Nu, Jakto, vi volas komuniki ion urĝan”.

“Efektive, kronprincdzina moŝto, tre urĝan. Mi petas al vi kredi nur unu aferon, moŝtino: la princeton minacas granda danĝero”.

“Ni jam sciis tion, Jakto”.

“Jes, moŝtino, kiel ĝeneralan fakton, sed mi konkrete parolas”. Li etendis manon en kiu estis rozkolora sfero. “Tiu bombono ne estas tia, kia ĝi aspektas, moŝtino, sed perlo de morto, per kiu certaj membroj de la gimdala ambasado intencas anstataŭi unu el la perloj de lunlumo kiuj staras en la princeta ĉambro”.

“Kaj kiel *vi* akiris ĝin, Jakto?” Aŝkasara demandis kun korfrostiga trankvilo.

“Ili donis, moŝtino, kun instrukcio ke mi faru la interŝanĝon”.

“Ĉu? Sendube ili havis kaŭzon atendi ke persona lakeo mia pretos obei tian instrukcion”. La senurĝaj tonoj de la kronprincdzina voĉo nur emfazis la mortigan minacon sub ili.

“Ili ĉantaĝis min, moŝtino, minacis disfamigi ke mi – ke mi, nu, provis trakti gimdalan sinjorinon laŭ nedeca maniero”.

“Provis perforti gimdalinon?”

“Por tiel diri, moŝtino”.

“Kaj ĉu vi – tion faris?”

“Mi ne, moŝtino, sed via kronprincezina moŝto ne povos kredi tion. Tial mi urĝis ke via moŝtino almenaŭ kredi min pri la danĝero al la princeto”.

“Ne povos kredi! De kiam, Jaktó, vi arogis al vi la rajton anticipi kion mi povos kredi aŭ ne kredi?”

“Mi petas pardonon, moŝtino; mi ne intencis impertinenton, sed tri juglandaj sinjorinoj atestos subtene al la akuzantino – kiu estas mem sinjorino – kaj neniu atestos miaflanke”.

“Tri juglandaj sinjorinoj? Ĉu vi rekonis ilin?”

“Jes, moŝtino; ili estis tri korteganinoj: iliaj moŝtinoj la Grafino de Elemir, la Grafino de Ŝaratero kaj - ”

“La Grafino de Ŝaratreo? Kie okazis tiu ĉi perforto? En la gineceo por amikinoj de Gimdalo?”

Iom mistifikite, Jaktó respondis: “Ne, moŝtino. En la palaca ĝardeno, apud la Leona Pordego”.

“Kiam?”

“Ĝuste ĉe krepuskiĝo, moŝtino”.

“Kion vi faris en la palaca ĝardeno? - ha, sed kompreneble, vi devis lasi la Palacon por reiri al – sed krepuskiĝo?”

“Efektive, moŝtino, mi ĝenerale pli fruis, sed detenis min Kospito kaj Olto, du lakeoj de la Grafo de Ŝaratreo – ”

“Ĉu vere? Kial?”



“Ili volis ke mi trinku pokalon kun ili je la okazo de - ”

“Vi estis ebria!”

“Ebria? Certe ne! – kun afabla permeso, moŝtino. Mi liptuŝis la pokalon pro nura ĝentilo; mi eĉ ne sentis deziron trinketi, sed ili tiel persistadis”.

“Do, do. Sed jam krepuskiĝis kiam vi transiris la ĝardenon, kaj – nu, ĝuste kio okazis tie?”

“Kiam mi pasis la kioskon apud la Leona Pordego, moŝtino, mi rimarkis sinjorinon sidantan en ĝi, kaj rekonis ŝin kiel la filinon de gimdala nobelo, La Markizo de Kojharamir, aŭ simile. Ŝi subite ekkaptis la flankon kaj krietis. Mi rapidis al ŝi por proponi, se konvene, helpon. Kiam mi atingis la kioskon, ŝi duonleviĝis kaj etendis brakon al mi kvazaŭ petante subtenon, sed kiam mi ektenis, ŝi subite ekkriis, ŝiris mian veston kaj provis grati mian vangon”.

“Ŝi sukcesis”.

“Kun permeso, moŝtino”, Jacto diris, “ne tiom kiom ŝi aspiris. Poste ŝi elkuris el la kiosko, kaj ĉirkaŭiris al la malantaŭo, vekriante. Mi sekvis, provante klarigi ke mi nur volas helpi, sed tri sinjorinoj aperis el la laŭbo sur la deklivo malantaŭ la kiosko, kaj ŝi kuris al ili kriante pri atenco. Mi sekvis, provante klarigi, sed ili ordonis al mi halti antaŭ ol ili vokos la pikedon ĉe la Pordego. Dume, ili informis min ke ili raportos la aferon kiel provon perforti, kaj ke mi atendu arestiĝon”.

“Ke vi *atendu* arestiĝon?” Aŝkasara jam ekĝuis la revenon de sia karakteriza memfido. La unua mencio pri Ŝaratreo konkretigis ŝian kreskantan senton ke Jacto estas senkulpa viktimo de gimdala komploto. Nun ŝi regis la situacion. “Ŝajnas ke vi vane atendis”, ŝi komentis.

“Nu, efektive, moŝtino. Anstataŭe, tri sinjoroj de la gimdala ambasado vizitis min, kaj informis min ke ili persvadis la sinjorinon prokrastigi formalan akuzon. Dume, ili promesis ke se mi faros ion por glatigi juglandajn-gimdalajn rilatojn, ili certigos ke ŝi fakte neniam faros la akuzon. Mi protestis ke mi estas senkulpa, sed ili memorigis ke mia `viktimo` estas nobelino, kaj ke tri aliaj nobelinoj sendepende atestos ke mi ĉasis ŝin en la krepusko. Mi devis agnoski ke neniu kortumo en la

mondo akceptus la vorton de lakeo kontraŭ tri – nu, kvar – respektindaj sinjorinoj, kaj ke ankaŭ via kronprincedzina moŝto ne povos malkredi kvar nobelinojn – por ne anticipi la opinion de via moŝtino”.

“Sed vi ja anticipas mian opinion, Jakto, “anticipas - kaj erare anticipas, ĉar mi povas tre *facile* malkredi kvar nobelinojn”. Aŝkasara estis nun en eĉ pli bona humoro. “Tio surprizas vin, ĉu ne? Kiel povas esti? Tre facile. Unue, ĉu mi estas stulta?”

“Plej certe ne, moŝtino”, Jakto fervore asertis.

“Ĉu mi estas snoba?”

“Snoba, moŝtino? Ĉu - ? Nu, por esti - kompreneble ne, moŝtino”.

“Sekve, mi kapablas uzi mian inteligenton neimplikitan de antaŭjuĝoj, kaj mia inteligento malkovras plurajn kaŭzojn por malkredi viajn kvar nobelinojn. Unue, la gimdalino: Viana de Kojharamir ne estas tia virino kia vagus sola en ĝardeno. Ŝi ne estas aparte malbela - eĉ bela, laŭ gimdalaj kriterioj – kaj kiu ajn observos ŝin ĉe festoj, baloj kaj simile, tiu certe rimarkos ke viroj svarme ĉirkaŭos ŝin kiel muŝoj putraĵon. KREDU, se ŝi volus promeni en ĝardeno, ŝi havus eskorton, kaj tamen tie ŝi sidis, sola, ĉe krepuskiĝo, en ĝardena kiosko, ĝuste kiam vi preterpasis! Due, kial vi ankoraŭ estis en la palaca ĝardeno kiam aliaj hejmenirantaj oficistoj jam trapasis ĝin? Nu, ĉar du lakeoj de la Grafo de Ŝaratreo detenis vin. Kaj kies edzino estas unu el la tri sinjorinoj kiuj tiel koincide estis en la laŭbo malantaŭ la kiosko – ĉe krepusko! – ĝuste kiam la tiel nomata atenco okazis? Ĉu mi ne jam suspektis ŝin, Jakto?”

“Vi ja, moŝtino, kvankam ŝi tiam ŝajnis senkulpa”.

Jes - ŝajnis, kaj mi lasis min konvinkiĝi ke ŝi estas tro stulta por perfido, anstataŭ scivoli ĉu ŝia edzo povas esti la motivanto. Do mi jam havas trian motivon malkredi viajn nobelinojn, kaj jen estas kvara: vi diras ke rifuzinte akcepti vian klarigon, ili ordonis ke vi foriru kaj atendu arestiĝon?”

“Ĝuste, moŝtino”.

“Sed estas pikeda budo apud la Leona Pordego, kaj almenaŭ du

sentineloj ĉe la Pordego mem. Do kial viaj sinjorinoj ne simple alvokis la gvardion, tiel certigante ne nur vian areston, sed ankaŭ ĝian formalan registron? Fakte, mi dubas ĉu iu perfortemulo riskus atencon ĝuste tie, kaj certe surprizas min ke neniu aŭdis vian viktimon”.

“Ŝiaj krioj ja ne estis tre laŭtaj, moŝtino”.

“Tion mi facile kredas. Fine, Jakto, viaj vizitantoj el la ambasado! Ĉu membroj de ambasado – eĉ gimdala – aŭdinte ke iu lakeo atencis la filinon de kolego, eluzus la okazon nur por progresigi la diplomation? Kaj kia patro permesus? Kompreneble, tiuj homoj estas senskrupulaj konspirantoj, kiel la tasko kiun ili asignis al vi klare indikas, sed ĉu kredeble ke ĝuste kiam ili bezonas perfidulon el inter niaj plej fidindaj servistoj, unu el tiuj – nome vi – bonvolas, pro nura hazardo, entrepreni krudan kaj elstare mallertan krimon, kiu ebligas ĉantaĝi lin?

“Sume, Jakto, estas ja ne konsilinde anticipi mian penson, sed ĉifoje mi pardonas vin, ĉar vi venis al mi, havante neniun konkretan kaŭzon kredi ke mi akceptos vian version de la tiel nomata atenco. Sed ĉar vi mem estas fidinda, vi sciis – eĉ subkonscie – ke mi iel scios la veron - vi fidis mian perceptemon, kiel mi fidis vian lojalon. Kaj nun, jen iom da konsilo: venontfoje, anstataŭ impeti por helpi iun virinon kiu ŝajne afliktiĝas aŭ minaciĝas, unue kontrolu ĉu ŝi estas gimdalino, kaj se jes – ha, jen la Kronprinco!” Ŝi indikis Jakton. “Kaj jen Jakto! Li havas gravan informon. Rakontu, Jakto – de la momento kiam vi provis lasi la Palacon”.

Jakto obee rakontis, malgraŭ multaj interrompoj, la historion de la komploto ĉantaĝi lin. La Kronprinco, silente aŭskultinte; poste komentis: “Nun estos facile vanigi tion; sola demando estas kiel plej efike?”

“Pendumigu la tutan bandon”, lia edzino proponis.

“Kontentige, juste, laŭmerite, sed ne plej efike”.

“Do kion?”

“Ni arestos la Ŝaratreo-paron, kaj trovos ĉu la aliaj du atestantinoj kunkulpas aŭ ĉu nur ekspluatiĝis. La kulpajn gimdalanojn ni hejmensendos, kaj la aliaj membroj de la ambasado povos konjekti kial, kaj raportu laŭplaĉe al siaj hejmaj instancoj”.

“Hm. Mi ne certas kial tio estos plej efika. Tamen certe restos ebloj. Mi mencias en letero al mia patrino kiom nin naŭzis malicega, kvankam ridinde fuŝa, atenco kontraŭ gastamo, aludante al la malestimego je kiu la civilizitaj nacioj aŭdos pri ĝi. Dume, ni impresu tiujn trivialajn protokanajlojn per io pli profunde memorinda. Jakto, jen kion vi devas - - - ”

La postan matenon, la Kronprincdzino, laŭ ŝia kutimo dum tiu sezono, promenis kun ŝiaj sinjorinoj en la rozĝardeno, sed ĉi tiun matenon ŝi abrupte reiris al la Palaco por prizorgi du brulantajn aferojn. Rezulte de tiu iom kaprica ŝanĝo de rutino, ili eniris la antaŭhalon de ŝia ĉambraro pli frue ol kutime, kaj ĝuste tiam la pordo de la princeta apartamento malfermiĝis kaj Jakto aperis. Li haltis necerte kiam li vidis la ĵusenvenintojn.

“Jakto!” ekdiris la Kronprincdzino, “kion vi faris tie?”

“V-via kronprincdzina moŝto! Mi – mi fakte serĉis vin, moŝtino, por – por raporti ke mi estas preta rekomenci mian deĵoradon ĉi tie”.

“Kompreneble vi estas preta rekomenci vian deĵoradon ĉi tie. Mi ordonis tion. Kaj kial serĉi min tie je tia horo? Kaj kial tie?”

“Mi opiniis pli prudente konfirmi plenumon de via ordono, moŝtino, kaj ĉar mi estis jam ĉi tie –”

“Sensencaĵo! Via ferio moligis vian cerbon. Reorientiĝu se vi ne volas lasi mian servon permanente – kaj io alia por memori: ekde nun ĉiu enironta aŭ lasanta ĉi tiujn ĉambrojn, krom tiuj kiuj eniras aŭ eliras kun mi aŭ la Kronprinco, serĉiĝos. Mi ĵus donis la ordonon; do ne ĉikanu kiam la gvardiano ekstere insistos.

Aŝkasara forturnis sin por paroli al la sinjorino plej apuda, kaj Jakto staris kvazaŭ afliktite. Li ĵetis urĝe petegan rigardon al la Grafino de Ŝaratreo kaj, kiam la aliaj sinjorinoj ekforturnis sin por sekvi la Kronprincdzinon en la buduaron, li alpaŝis ŝin, kvazaŭ dum iro al la ekstera pordo, formante perlippe la vortojn “Mi faris”, kaj ŝia mano ricevis de li dumpase ion globforman kiun ŝi senprokraste transmetis en robofaldon, rekoninte ĝin kiel la ŝanĝitan bombonon.

La alia brulanta afero por kiu Aŝkasara frue lasis la rozĝardenon estis por

kontroli ĉu la aranĝoj por la bankedo sub la aŭspicio de la kronprinca paro progresas kontentige, kaj ke invitoj atingos la ĝustajn personojn, precipe certajn membrojn de la gimdala ambasado. Poste, ŝi forsendis siajn sinjorinojn kaj venigis Jufrason Aŭrion, unu el la specialistoj kiuj konsilas la Imperiestron. La speciala fako de konsilanto Aŭrio estas la farmacio.

La invitoj surprizis multajn ricevintojn, sed ĉiuj akceptis, krom la Grafino de Ŝaratreo, kiun enlitigis atako de koliko kaj naŭzo. Pro tiu malsano de lia edzino, la Grafo sendis al la Kronprincedzino ĝentilan leteron en kiu li fidis al ŝiaj kompatoj kaj komprenemo konsenti ke li mem ĉi tiun fojon malakceptu ŝian plej afablan kaj komplezan inviton, por restadi ĉe la flanko de la virino kiun li amas. La Kronprincedzino respondis ke li ĉeestu sen plua ĉikanado.

La bankedo ne estis furore sukcesa, ĉar la Kronprinco, kiel kutime, diris malmulton, kaj lia edzino estis tre elektema rilate tiujn por kiuj ŝi bonvolis malfermi la lipojn. La gastoj devis kontentiĝi pri la elstara kvalito de la manĝo kaj la vino, kaj eĉ tiuj ne estis fonto de ĝojo senlima por ĉiuj gustumintoj. Dum la nokto certaj membroj de la gimdala ambasado kaj unu juglandano – la Grafo de Ŝaratreo – vekiĝis, sentante sin ekstreme malsanaj. La simptomoj similis tiujn de disenterio, sed ili estis malpli mildaj, kaj pli variaj. La pacientojn konvulsiigis torturaj krampfoj kaj iskiaj nervinflamoj; ili blindiĝis pro neelteneblaj kapdoloroj; ili sentis ke la koroj elsaltos la brustojn kaj entute plej sincere volis sin mortaj, sed la palacaj kuracistoj, helpe de antidotoj kaj konsiloj de Jufraso Aŭrio, ne permesis tion. Fine, tre grade, post por ili nekalkuleblaj tagoj kaj noktoj de turmentego, ili regajnis ian sanstaton, kvankam ili restis malfortaj kaj trememaj. Tamen ili kapablis promeni, kaj kiam la Kronprinco kunvokis la ataŝeojn, ili ĉiuj povis ĉeesti. (La Grafo de Ŝaratreo ne povis, sed tio estis pro lia enkarceriĝo).

Eĉ ilia malforta stato ne povis bridati ilian scivolemon; kiel tiu seka ŝtupo kondukos sub la neceso trovi diplomatian klarigon pri la farsa – preskaŭ tragedie farsa - rezultato de tiu bankedo?

La Kronprinco envenis, kaj post rapida ĉirkaŭrigardo, diris: “Mi aŭdas ke vi nun sufiĉe resaniĝis por veturi. Do adiaŭ. Taĉmento de la Palaca Gvardio eskortos vin al la landlimo”.

Lia edzino tre admiris tiun paroladon, kaj uzis ĝin kiel modelon kiam estis ŝia vico; tio estas, kiam ŝi intervjuis la Grafon de Ŝaratreo, ĉar li estas oficiale unu el ŝia propra sekvantaro. Ŝi vizitis lin en lia ĉelo, kaj diris: “Mi aŭdas ke vi nun sufiĉe resaniĝis por ĉeesti vian proceson. Do tio okazos morgaŭ via senkapigo postmorgaŭ. Kiel fartas via edzino?? Nebone. Fakte, la febro tiom intensiĝis ke ĝi eble anticipos la eŝafodon”.

La kronprinca paro facile konfirmis la senkulpecon de la aliaj du atestantinoj, intervjuante ilin aparte, kaj poste komparante la respondojn al siaj demandoj. Ambaŭ sinjorinoj ŝokiĝis je la sugesto ke ilia kunulino kaj la gimdala sinjorino konspiris kontraŭ la lakeo, kaj komence rifuzis kredi ke ilia amikino Hilfajna povas esti ŝtatperfidulino, malgraŭ ŝia iniciativo rilate la arestan proceduron. Fakte, la Grafino de Elemir, kiun Aŝkasara intervjuis, eĉ emis indigniĝi pri la akuzo, sed ŝia ardo rapide malvarmiĝis sub la kronprinceca rigardo.

Poste Aŝkasara venigis Daleŝ Karabon, kaj ordonis ke li malfaru ĉion en la hiacinta koridoro kion li tie antaŭe faris, lasante ĝin tia ke, kiam ĝiaj antaŭaj enloĝintoj revenos, ili ne povos rimarki iujn signojn ke la strukturo iam ŝanĝiĝis.

“Mi supozas ke tio eblas, ĉu?” si demandis.

“Ho jes, moŝtino, certe”, li respondis entuziasme. “Eĉ la odoron de freŝa mortero mi povas kaŝi per – ”

“Ankaŭ tio estas tre dezirinda; oni kredu ke ni evakuis ĝin simple kiel protekta rimedo kontraŭ insidatakoj. Mi fidas vian kompetenton kiom vian diskreton”.

“Mi eltranĉus mian lang – ”

“Tio estus tute nekonvena, ĉar vi devas paroli al via helpantaro por certigi ke ili estos same forgesemaj kiel vi mem. Kio estas via nuna rango?”

“Mi estas majstromasonisto, moŝtino”.

“Nur? Ekde nun vi estos ankaŭ vicadministranto por la okcidenta koridoro. Mi oficialigos tion tuj kiam mi trovos promocion por la nuna posttenanto”.

Aŭskultinte kiel eble plej pacience al la dankoj de Daleŝ Karabon, Aŝkasara venigis Jakton, kaj komencis paroli pri lia neveto , kiun ŝi jam alvokis por tujposta intervjuo, sed interrompis sin: “Pri via neveto, Jakto – sed unue, kiel plaĉus al vi fariĝi oficisto?”

“Oficisto, via kronprincezina moŝto?”

“Jes, Jakto, oficisto”.

“En la servo de via moŝtino?”

“En la servo de iu ajn. Via funkciado kiel sekretario estis oficista laboro, kaj kvankam nura ŝajnigo, vi montris veran talenton pri ĝi laŭ via estro. Kiel plaĉus al vi fariĝi permanenta oficisto?”

“Por esti sincera, moŝtino – ”

***La cetero de tiu ĉi romano ne troviĝas en tiu ĉi proveldono. Vi povas mendi la kompletan verkon ĉe [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be) aŭ per la retejo [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).***

# Kolofono

Titolo: Kronprincedzino

Aŭtoro: John Francis

Kovrilo: Julia Litvinova

Tekstaranĝo: Erik D'Hondt kaj Paŭl Peeraerts

ISBN: 978 90 77066 47 8

UDK: 82.3.892

NUR: 330

Leĝa depono: D/2011/2924/1

IBAN: 12-02-340-89

Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekensstraat 169 - 2060 Antverpeno

[www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be)

© 2011 FEL, Antverpeno